der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde der DDR im Deutschen Kulturbund

5. Jahrgang Nr. 32/33 Juli/August 1969 Doppelheft 50 Pf

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

Survoje al 20-a jubileo de GDR

Nia Germana Demokratia Respubliko estas la socialisma ŝtato germannacia. Ĝi estas la unua ŝtato de paco, homeco, demokratio kaj sociala sekureco en nia historio. Per la socialisma ordo ni venkis la ekspluatadon kaj agreson, la malhumanecon kaj subpremadon, simptomoj karakterizantaj pasintajn en nia historio sistemojn kaj ankaŭ la hodiaŭan ŝtaton en Okcidenta Germanio.

Kie staris kaj staras germanaj ŝtatoj 20 jarojn post ilia fondo? La germana imperio, per armiloj tintante strebis al novdivido de la mondo. La Vejmara Respubliko (Germana respubliko 1919—1933 / la tradukisto) ekzistis nur 14 jarojn. Ĝi fiaskis, ĉar en la ŝtataparato restadis la imperiaj generaloj kaj la armiloproduktantaj monopoloj, kaj ĉar la dekstraj socialdemokrataj gvidantoj estis perfidintaj la intereson de la popolo; tio al la germana imperialismo ebenigis la vojon por la malkaŝa faŝista diktaturo. La „Miljara Regno“ de la naziaj murdistoj de nia propra popolo kaj de aliaj popoloj rompiĝis jam post dekduo da jaroj sub la batoj de la Sovetarmeo, puŝmalferminta, kiel plej grava forto de la kontraŭhitlera koalicio, la pordegojn en novan, homecan mondon. La okcidentgermana ŝtato, klopodanta haltigi la fluon de la historio, 20 jarojn de sia ekzisto uzis, por revivigi ĉiujn reakciajn tradiciojn de la germana historio, daŭrigi kaj konstante pliakrigi la agresan politikon de la germana imperialismo en- kaj eksterlanden. Okazigita per imperialismaj potencoj disfendo de Germanio servis al la restarigo de la iamaj potencinterrilatoj. Laŭ la spertoj de du mondmilitoj, faritaj desur germana teritorio, tiu paŝo sin direktis kontraŭ la paco de la popolo kaj la vivinteresoj de la nacio.

Kiel parto ĉe konstruado de nova mondo kaj kiel respondo al la disfendo de Germanio per la imperialismaj potencoj ni kreis en Germana Demokratia Respubliko nian socialisman ŝtaton germanonacian. Kun ni estas la revoluciaj spertoj kaj humanismaj tradicioj de la germana historio. Kun ni estas la sciencaj doktrinoj de Marks, Engels kaj Lenin. Kun ni estas niaj plej bonaj amikoj, la popoloj de USSR, ilia Lenina partio. Kun ni estas la socialisma ŝtatokomuneco. Kun ni estas ankaŭ la esperoj de sennombraj laboristoj, terkulturistoj kaj laboraj kamparanoj, metiistoj kaj studentoj, entreprenistoj kaj intelektuloj en Okcidentgermanio kaj Okcidentberlino. Kun ni estas la konfido kaj la certeco de ĉiuj popoloj. kiuj fidas al la germana pacoŝtato en la centro de Eŭropo. Estimo kaj internacia aŭtoritato de GDR pro tio konstante kreskis. En pliiĝanta dimensio en la mondo oni ŝatas, kion realigas la loĝantaro de nia socialisma ŝtato.

En nia Germana Demokratia Respubliko — en tiu parto de la lando de Goethe kaj Bach, de Marks kaj Engels, de Heinrich kaj Thomas Mann, en kiu realiĝis la revoj de la plej bonaj filoj de nia popolo — la unuigita laborista klaso, ĝia marksisma-leninisma partio kaj ĉiuj alianciĝintoj en Nacia Fronto ĉiutage pruvas siajn kapablojn, por plenumi la intereson de la nacio.

Fiera bilanco post 20 jaroj!
Ĉe ni venkis la socialismaj produktadaj interrilatoj. Ĉe ni la popolo mem al si donis sian propran socialisman konstitucion. Ĉe ni kreskas la socialisma homokomuneco. Ĉe ni la tuta popolo estas kreinto kaj pose-

danto de ĉiuj trezoroj de siaj kleriga kaj eduka aferoj, de siaj scienco kaj arto. Ni apartenas al la venkantoj de la historio.
La labora popolo, unuigita sub la gvidado de la laborista klaso kaj ĝia revolucia partio, estas nia potenco. Per ĝi ni helpis solidigi la plej longan pacan periodon en Eŭropo de la nuna jarcento. La potenco de la labora popolo ankaŭ plue kapabligos nin batalakiri sukcesojn por paco kaj sekureco. Tiamaniere ni staras en la koro de nia maljuna kontinento, la plej firma, plej sukcesa, kun la teorioj de daŭrintaj dum jarcentoj bataloj kaj la revoj de la plej eminentaj homoj de nia popolo pleje asociita ŝtato de germana historio.
Al la „sekreto“ de niaj sukcesoj apartenas, ke ni iras nian vojon alcele en la komuneco de veraj amikoj — ĉeflanke de la Granda Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj, asociite kun ĉiuj socialismaj frataj popoloj kaj la progresivaj fortoj de ĉiuj landoj. La bilanco: Ni antaŭas la malnovan socion — la nesanktan aliancon de banko, administra konsilantaro kaj generalstabo — tutan epokon.
Malgraŭ tio ni ne forgesas, kiom ankoraŭ necesas fari. Nenio al ni defalis de la ĉielo. Hodiaŭ ni returnrigardas ankaŭ al periodo de malfacilaj bataloj, multaj oferoj kaj komplikaj disputoj. Ni ankaŭ estonte ne timevitu penojn. Fiksinte jam celpunktojn por la sekvontaj jardekoj, ni firme turnas la rigardon al la taskoj de la proksimaj monatoj kaj jaroj.
Grandaj taskoj staras antaŭ ni.
De post la VII-a kongreso de la Socialisma Unuecpartio de Germanio ni estas realigantaj la evoluigitan socian sistemon de la socialismo. Ĝi estas la science ekzakta modelo de la bela kaj certa estonto, dezirata de ĉiuj. La kerno de la evoluigita socia sistemo de la socialismo estas tio, ke ĉiuj flankoj de socia proceso kaj ĝia reciproka dependeco kaj interplektiĝo estu komprenataj kaj komencata ilia praktika realigo. Ĉiujn partajn sferojn de la vivo ni volas konduki al egala progresema nivelo: sciencon, ekonomion, socialisman demokration, klerecon, kulturon, defendon de la ŝtato. La evoluigita socia sistemo estas granda harmonia tutaĵo.
Decida malgraŭ ĉio ĉi estas la krea forto de la homoj, la kreskado de la homokomuneco. La ŝtatordo de nia Germana Demokratia Respubliko prezentas la plej altan evoluŝtupon de la demokratio, la socialisman demokration. Neniam ankoraŭ en Germanio ekzistis tia ŝtato, kiu en tiom multampleksa maniero povis sin apogi sur la demokratian aktivecon kaj solidaran respondecon de milionoj da civitanoj, kiel ili manifestiĝas en la principo, praktikata ĉe ni jam de multaj jaroj: „kunlaboru, kunplanu, kunregu“.
Ni perfektigas la ekonomian sistemon de la socialismo, pli kaj pli bone aplikas ĝin, por ke nia nacia enspezo konstante kresku kaj estu utilige uzata.
La ĉefproblemo de la plej proksima tempo estas la realigo de laborkapabla moderna scienĉorganisacio kaj socialisma gvidado en ŝtato kaj ekonomio.
Akcele ni evoluigas kaj utiligas la sciencon kiel ĉefan produktivan forton. Tio ebligas al ni, majstri la taskojn difinantain strukturon, raciigi komplekse, formi pli efektive planadon kaj gvidadon, atingi pionirajn farojn kaj antaŭeniri en decidaj sferoj ĝis la mondrekordo. Ĝi ebligas al ni malpliigi la kostojn kaj atingi plej altan kvaliton. Sub la dinamikaj kondiĉoj de la scienc-teknika revolucio sendube tio ebliĝas nur tiam, kiam ni ĉiuj agados laŭ la devizo: Ĉiu devas lerni, lerni dum sia tuta vivo!
(El „Alvoko okaze de la 20-a datreveno de la fondo de GDR“)

Trad. W. Zimmermann

Nia juna Berlin

La 7-an de oktobro ni festos la 20-an datrevenon de la fondiĝo de nia ŝtato. Sed ni ne omaĝos ĝin per platonaj amkonfesoj, nia donaco konsistas el konkretaj agoj. Multaj konstruprojektoj estos realigitaj ĝis tiu ĉi templimo. Ĉe aliaj konstruaĵoj estos finitaj decidigaj konstruetapoj. Kaj kio ĉefe ĝojigas la berlinanojn estas la malfermo de la tele - kafejo, kiu tronas en pli ol 200-metra alto de la UKO- kaj televida turo, de la ĉion superanta ekkonilo de nia urbo. Per siaj 365 metroj tiu ĉi giganto el ŝtalo kaj betono estas post la moskva televida turo la dua laŭ alteco en la mondo, tamen du ecoj diferencigas ĝin de ĝiaj „gefratoj“ en aliaj urboj.

La berlina „teleasparago“ — kiel la urbanoj ŝerce nomas ĝin — situas en la koro de la urbo kaj la instalaĵoj por la dissendado same kiel la kafejo kaj belvidejo estas la unuan fojon lokigitaj

en ŝtala globo, kiu havas diametron de 32 metroj kaj pezas ĉirkaŭ 5000 tunojn. En ĝi troviĝas sep etaĝoj, kvin por teknikajinstalaĵoj kai por la dissendado, kaj du estas destinataj ekskluzive al la vizitonoj. En preskaŭ 204-metra alto troviĝas la belvidejo, kaj 3,5 metrojn pli supre estas la kafejo. En nubproksima alteco la kafejo prezentas al 200 gastoj dum unu horo nekutiman urban rondvojaĝon sur speco de turnplanko.

La laboroj por la televida turo komenciĝis en 1966, tiam preskaŭ ne atentitaj de la berlinanoj. La betona ŝakto atingis la 250-metran limon jam komence de junio 1967, kaj en aŭtuno 1968 ĝi tiklis jam la nubojn en pli ol 360-metra alto. Tio, kion ĉi tie atingis niaj turkonstruantoj, sen citinda akcidento, kaj per helpo de plej nova tekniko, estas unika. Tiu ĉi laŭdo validas cetere por ĉiuj 6000 laborantoj en la urba centro, kiuj ĉe aliaj gravaj konstruaĵoj ĉirkaŭ Aleksandro-placo donas al nia ĉefurbo la aspekton de socialisma metropolo.

Kio estus vizito de la ĉefurbo sen promenado en la bulvardo „Sub la Tilioj". Ĉi tie iam la berlinaj grandmonduloj frekventis luksajn domojn, palacojn kaj hotelojn. Hodiaŭ apartenas tiu ĉi novkonstruita ĉefstrato — ankaŭ ĝi estis ŝanĝita dum la dua mondmilito al ruinarejo — al la berlinaj laboruloj kaj la iliaj gastoj. Ĉi tie oni rendevuas, ĉi tie la berlinano ŝatas promenadi por rigardi la montrofenestrojn. Ankoraŭ multon oni povus rakonti pri la ofte prikantita promenejo inter la placo de Marx kaj Engels kaj la Brandenburga Pordego. Tie troviĝas la ŝtata operejo, la nova impona konstruaĵo de la ministrejo por ekterlandaj aferoj, la memorejo por la viktimoj de la faŝismo, la Humboldt-universitato, la ambasadorejo de Sovetunio, por nomi almenaŭ kelkajn.

Jen ni subite staras en la varmeta somera vespero antaŭ la Brandenburga Pordego, kiu hodiaŭ disigas du mondojn, tiun de la socialismo sur germana teritorio kaj tiun de la imperiismo en la memstara politika unuo de okcidenta Berlino, meze sur la teritorio de nia ŝtato. Kiel aspektas la realeco de tiu ĉi urbo, tion elbabilis antaŭ nelonge „Die Welt" („La mondo" — okcidentgermana gazeto), publikiginte karakterizajn statistikojn pri okcidenta Berlino kaj pri la ĉefurbo de GDR. Se oni transkalkulas la sekvantajn ciferojn analoge al la diferenca nombro de loĝantoj, montriĝas laŭ „Die Welt" jena rezulto:

Po unu miliono da enloĝantoj ekzistas

	en okc. Berlino	en la ĉefurbo de GDR
Malsanulejoj kaj poliklinikoj	63	79
litoj en malsanulejoj	15 963	16 222
teatroj	8	10
operejoj	1	2
kinejoj	69	31
muzeoj	7	22
stadionoj	4	18
sportejoj, gimnastikejoj, ludejoj, trejnejoj	104	112
subĉielaj naĝejoj	12	17

Ankaŭ ĉi tie montriĝas la okulfrapa diferenco inter tiu artefarita formitaĵo, kiu troviĝas malantaŭ la Brandenburga Pordego kaj kiun oni volas utiligi kiel pulvujon, kaj inter nia floranta ĉefurbo, kiu similas al memkonscia giganto, sana, forta, plena de vervo kaj agemo — ĝuste vera berlina infano, infano de socialismo.

(Albert Jaritz en „Berlin-letero")

Trad. Dieter kaj Renate Bernd

Mi vivas en GDR

Rosemarie Günther
diplomita ĝardenistino en la Ĝardenkultura Produktada Kooperativo „Trifolio“

Mi ne scias, kial ĝuste mi rakontu pri mia vivo, nenio estas rimarkinda en ĝi. Ĉio estas tutkomprenebla, . . . Mia familio en la movo de transloĝigo 1945 en Bitterfeld trovis novan hejmurbon, kie mia patrino ankoraŭ en nuna tempo laboras kiel instruistino. Mi finis la mezan lernejon kaj post kvinjara sukcesa universitata studado ricevis la diplomon de ĝardenisto. En tiuj jaroj mi ankaŭ konatiĝis kun mia posta edzo. Studenta edzeco ĉe ni estas ankaŭ nenio eksternorma, kaj nia fileto Volker — nuntempe dujara — rapidis, por povi saluti min post sukcesa finekzameno. Post negranda somera paŭzo mi komencis mian laboron en ĝardenkultura produktadkooperativo. Malgraŭ komencaj skrupuloj mi lokis mian fileton en infanvartejo por pago de 20 markoj pomonate. Mi entuziasmiĝis pri tio, kiel amplene oni zorgas pri la etuloj, nutras kaj jam ankaŭ edukas ilin. Mia edzo, kunlaboranta en naturscienca muzeo kaj preparanta nuntempe sian disertacion, tute memkompreneble nian Volker akompanas al kaj forakompanas de la infanvartejo, faras provizaĉetojn kaj malŝarĝas min ankaŭ en la mastruma laboro. Por ke pleniĝu nia feliĉo, ni antaŭ nelonge sukcesis interŝanĝi nian loĝejon en malnova domo en centro de Berlino por bela du-kaj-duonĉambra loĝejo, situanta ĉe la urba periferio, kiun ĵus ni finis renovigi. Kvankam nia edzo, estante aspiranto, ankoraŭ ne tro multe salajras, ni dum lasta jaro povis aĉeti la meblaron por dormĉambro, loĝoĉambro kaj kuirejo kun ĉiuj detalaĵoj. Tio ne estas miraklo, ĉar mi bone salajras. Aldone al mia pomonata salajro de 900,— markoj mi ricevas ĉe la jarfina pago ĉirkaŭ 2000,— markojn; krom tio premiojn proksimume 1500,— markojn, ĉar mia sekcio ĉiam superplenumas sian planon kaj de tio ricevas dividendon de 20 procentoj.

Jes, nia kooperativo estas sufiĉe bona. En la ĉefa kombinato, kie mi laboras, ni havas 1,8 hektarojn da varmkultureja areo, sur kiu ni kreskigas preskaŭ nur diantojn. Krom tio apartenas al ni ankoraŭ 16 malpli grandaj ĝardenkulturejoj kaj multnombraj vendejoj sur urba teritorio. Tio komence — estas vere — ne ĉiam estis facila, ĉar multaj el la iamaj posedantoj de etaj laborejoj devis alipensi, kaj unuatempe ili ekmiregis, kiam mi mendis mineralan sterkon po tunoj. Nuntempe ni povas al ni permesi, aĉeti la plej modernajn maŝinojn, konstruis grandan hejtejon, krome administran kaj socialan domon kun modelaj pluvbanaj instalaĵoj, manĝejoj kaj klubejoj. Kaj jam ekzistas ankaŭ planoj por pligrandigo.

Miaj personaj planoj —? Tiurilate jam ĉio estas klara. Kiel sekvonta pli grandpeca aĉeto estas planata aŭtomobilo kaj — ni deziras havi ankoraŭ infaneton. Jes, kaj plue, kiel novelektita prezidantino de nia laboreja virina komitato mi volas pledi por la problemoj de niaj virinoj kaj junulinoj, helpi ilin en plua plibonigo de iliaj labor- kaj vivokondiĉoj.

Mi ne scias, kial ĝuste mi estis petata, rakonti el mia vivo. Ĉi-ĉio ja ne estas io eksterordinara, aparta, ĝi estas la realeco de nia vivo.

(El „Berlina letero“) *Trad. W. Z.*

Ĉiu ŝtatano de la Germana Demokratia Respubliko havas la rajton je protekto de sia sano kaj de sia laborforto. Dum malsano kaj post akcidentoj estas garantiataj sur bazo de socia asekursistemo senkosta kuracista helpo, medikamentoj kaj aliaj medicinaj objektaj plenumoj.

(El artikolo 35 de la konstitucio de GDR)

Ĉiun zorgon por la homo

Komenciĝis per la malavara helpo de Sovetunio, kiun ricevis ankaŭ nia sanitaro ek de la jaro 1945, kiam nova Germanio ekkonstruiĝis. Sen la multflanka subteno materia kaj idea fare de la sovetaj samklasanoj tiutempe ni ne estus povintaj krei la solidan fundamenton, kiu ebligas al ni hodiaŭ fiere rerigardi la evoluon de la medicinaj scienco kaj organizo en la GDR.

Bilanco post 20 jaroj: miliardoj da markoj por la sanprotekto. En dudek jaroj de sukcesa sanpolitiko la nombro de kuracistoj kaj dentkuracistoj en nia laborist-kamparana ŝtato pligrandiĝis. En la jaro 1969 laboras 24 000 kuracistoj kaj 4600 dentkuracistoj en la ŝtataj sanitaraj kaj socialaj institucioj. En 1950 disponis 10 000 loĝantoj pri 7,16, 1967 jam pri 13,3 kuracistoj ne konsiderante la dentkuracistojn. La nombro de ĉiuj salajratoj en la ŝtataj sanitaraj kaj socialaj institucioj kreskis jaron post jaro. Ĉirkaŭ 345 000 personoj dediĉos sin en la 20a jaro de nia respubliko al la sanprotektado kaj al la medicina kaj socia prizorgoj de la loĝantaro. Pro la reciigado progresanta en la lastaj jaroj kaj pro la aliigo de la kvalifikaj strukturoj pliiganta la altkvalifitajn medicinajn fakulojn, tiu nombro ne nur estas taksebla kvante. En la sola jaro 1969 denove 700 fakuloj komencas profesian agadon en la ambulanca medicina prizorgo de la loĝantaro.

La speciala zorgo de la socialisma laborist-kamparana ŝtato por la laboranta loĝantaro speguliĝas en laboreja sanitaro. Dum la lastaj 16 jaroj oni instalis 53 poliklinikajn punktojn en la laborejoj kaj laborigis tie kuracistojn respektive kvalifitajn sanitaristinojn. Hodiaŭ la laborej-sanitaro ampleksas 89 poliklinikojn, 230 ambulancojn kaj 3299 laborejajn sanitarpunktojn.

Ankaŭ en la sfero de la sociala prizorgo ni povas rerigardi al atentigaj kreskaj sukcesoj. Per pli ol 175 000 lokoj en infanvartejoj, po 1000 infanoj antaŭvideble disponos en 1969 pri 222,8 lokoj, en 1965 estis 165,3 lokoj po 1000 infanoj. Entute 326 022 kuracaj restadoj okazis dum la jaro 1967 en la tiuspecaj institucioj de la ŝtata sanitaro. Karakteriza estas por la socialisma sanitaro, ke la preventaj kuracoj relative plej pliiĝis. Por tio en la jaro 1969 ĉirkaŭ 105 000 lokoj estas uzataj en la kuracejoj de la sanitaro.

Entute la socialisma ŝtato plane elspezas por la celoj de la kiel eble plej bona medicina kaj sociala prizorgoj de siaj ŝtatanoj grandegajn monrime-dojn. Ili sumiĝas nur en la lokaj institucioj de la sanitaro kaj socialo por la jaro 1969 ĉirkaŭ al 3,4 miliardoj da markoj.

(Trad. Dr. P. W. Ruff el „DDR-Revue“ 4/69)

La kresko de la nacia enspezo

Depost 1950 ĝis 1968 la nacia enspezo de GDR kreskis trioble. En la 20-a jubilea jaro de GDR unuafoje ĝi atingos la kvanton de pli ol 100 miliardoj da markoj.
La kreskanta socia riĉaĵo ebligis altigi la realan salajron depost 1950 je la trioblo kaj duono.
La elspezo de nia ŝtato por popola klerigo, profesia klerigo, sporto, saneco- kaj socialaj aferoj, scienco, arto kaj kulturo duobliĝis en la lastaj 12 jaroj, nun ampleksante pli ol 24 miliardojn da markoj. Oni enkondukis la 5-tagan laborsemajnon plialtigante la salajron kaj plilongigante la minimumajn feriojn. Hodiaŭ nia industrio produktas en 10 monataj tiom, kiom 1936 oni produktis en unu jaro en tuta Germanio. *(El la „Tezoj okaze de la 20-a jubileo de GDR")*

Karl Marks estus kontenta,

opinias Frits Sieger, Nederlando. La 76jara estimata skulptisto laboras nuntempe je skulptaĵo el plej malmola afrika ligno, donaco por la 20jara GDR. Li diras pri tio:
„Estiĝos Marks, kiu kontente rigardas jenan parton de sia patrujo, kie la scienca socialismo estas realeco. Kaj li pravas. Liaj adeptoj bone laboris. Tion devas koncedi tie ĉi eĉ burĝaj gazetoj.
Mi mem admiras ĉe la germanaj komunistoj — precipe en la GDR — ilian neskueblan internaciismon, al kiu ili restis fidelaj eĉ sub plej pezaj batoj. La ligno, kiun mi elektis por la skulptota kapo de Karl Marks, simboligos tiun ĉi persistemon por principo. Estas harda, malceda ligno, el kiu estas formataj batalantoj.
Post la dua mondmilito mi kreis la memorejon en la iama koncentrejo Amersfoort, kie estas murditaj centoj da nederlandaj patriotoj kaj sovetaj soldatoj. Kun ega ĝojo mi nun laboras je donaco por la ŝtato de la germanaj laboruloj kaj kontraŭfaŝistoj." *Trad. R. Rabenalt*

GDR — ekonomio kun kreskanta dinamiko

Faktoj el la statistika raporto pri la evoluo de nia popolmastrumado 1968.

— La nacia enspezo de GDR plialtiĝis rilate al la antaŭa jaro je 5,3 % aŭ 5 miliardoj da markoj.
— La investoj pli altiĝis je pli ol 10 %. Estis investitaj en la nacia mastrumado 26,5 miliardoj da markoj, tio egalas preskaŭ la tutan nacian enspezon de GDR en la jaro 1950.
— La industriproduktoj pliiĝis je 6,1 procentoj.
— La fabrikado de produktoj, laŭ decido de la ministraro destinantaj la strukturon de la nacia mastrumado, pliiĝis je ĉirkaŭ 35 % kompare al 1967.
— La materiala-teknika bazo de la agrikulturo plie firmiĝis. 11030 novaj traktoroj, 739 falĉo-draŝomaŝinoj, 863 rikoltomaŝinoj kaj 306 selektomaŝinoj por terpomoj, k. a. liveritaj de la industrio, ebligis plifaciligi kaj raciigi la laboradon.
— Kompare al la antaŭa jaro la monenspezoj de la popolo plialtiĝis je 3,9 miliardoj da markoj aŭ je 4,9 procentoj *(el GDR — revuo 3/69)*
Trad. R. Rabenalt

La eksterlando pri ni

La Ligo por Popola Amikeco de GDR eldonis 1967 en Esperanto broŝuron kun la titolo: „La germana popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj", kiu ricevis vastan eĥon inter la esperantistaro tutmonde. Ni ĉisekve publikigas kelkajn opiniojn pri la Germana Demokratia Respubliko:

G. Holmkvist, Malmö, Svedio

Ĝuste tial, ke GDR estas por senarmigo, por egalrajta kunlaboro, por paca kunekzisto kaj kontraŭ nuklearmiloj, kontraŭ imperiismo kaj novkoloniismo, ĝi nepre devas havi lokon kaj voĉdonrajton en la Unuiĝintaj Nacioj. Kiu baras la vojon de GDR ricevi tiun tute pravigitan membrecon en UN? Tion faras Usono kaj ĝiaj satelitoj kiuj pro sia agresema politiko en la tuta mondo kaj pro sia milito en Vjetnamio evidente rompas la celojn kaj la principojn de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj. Por ke la Unuiĝintaj Nacioj plenumu sian gravegan celon por kiu ĝi estas fondita, devas regi ordo kaj firmaj principoj en la organizaĵo. Ĝuste tiel la disciplinema kaj pacama GDR ricevu naturan domicilon en la organizaĵo. Kaj la postulo de ĉiuj progresemuloj kaj pacamikoj estas, ke GDR ricevu sian membrecon en UN senprokraste.

M. Mariano, Savigliano, Italio

Ni ĉiuj konkordas ne nur pri la egalrajteco de la G.D.R. por esti ekceptata kiel ordinara membro de la Unuiĝintaj Nacioj; sed ĝuste, kiel vi tre bone kaj prave demonstras, la principoj kaj spirito mem, kiujn la U.N. celas, postulas ke via demando estu akceptata senceremonie.

Bulgara Esperanto-Societo en Loveĉ

Ni scias ke la Germana Demokratia Respubliko estas pacama suverena ŝtato, kiu respondas al ĉiuj kondiĉoj por membreco en la organizo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj havas la volon kaj kapablon plenumi ĉiujn el tio devenantajn devojn.

Ni scias ke ĝia membreco en la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj havos favorajn sekvojn por la efektivigo de ties politiko por konservado kaj sekurigo de la paco en Eŭropo, kaj samtempe ĝi kunhelpos al la efektivigo de la universaleco de la Unuiĝintaj Nacioj.

Ges-roj Zipfel, Strasbourg, Francio

Kiel gastoj de GDR dum junio 1962 ni propraokule konstatis la rekonstruon, certe kun grandaj penoj sed des pli sendependa kontraŭe al la „amerika parto" de Germanujo.

Knudsen, Holbak, Danlando

DDR estas hodiaŭ fakto, kaj oni ne povas ignori la pacodezirojn de la homoj en GDR.

E. Joseph-Levallojs-Perret, Francio

Neniu malamika sento kontraŭ la germana popolo estas en mia penso. Kompreneble mi preferas la Germanan Ŝtaton Demokratan kontraŭe al tiu, kies registaro postulas militan akiron de landoj.

N. Gusev, Novgorod, Sovetunio

Ni, la laboruloj de la socialismaj landoj ĉiam estas pretaj ĉiumaniere subteni la fratan germanan popolon de Socialisma Germanio.

Ni povas agiti por la problemo en nia korespondado kun niaj multnombraj eksterlandaj korespondamikoj kaj kun granda plezuro ni faras tion.

Tanaka Sadami, Osaka, Japanio

Mi esperas, ke germana popolo kontribuas por venigi veran pacon en la mondon manenmane kun pacamantaj popoloj, precipe en nuna tempo, por realigi retiriĝon de Usono el Vjetnamio.

Treffle Mercier, Quebeek, Kanado

Mi samopinias kun vi, ke la Germana Demokratia Respubliko kiel ĉiu nacio devos esti akceptita en la vicojn de la Unuiĝintaj Nacioj.

Morris Mennell, Devonport, Nov-Zelando

Mi tute konsentas kun la deklaro de Prezidanto Ulbricht, ke „la aŭtoritato kaj aktiveco de la agado de la organizo de la Unuiĝintaj Nacioj estus konsiderinde plifortigita, se ĝi akceptus ĉiujn interesitajn ŝtatojn, konforme al la principo de universaleco".

Evidente, la ĉefa malhelpo al membriĝo de ambaŭ germanioj en la U.N., estas la reakcia politiko de la Bonn-a estraro. Ĉi-tie, oni maltrankvile rigardas la kreskadon de NPD en Okcidentgermanio. Bonege oni memoras la eventojn de la jardeko 1930—1939!

Alberto Fernandes, Gent, Belgio

Mi certe ne bezonas klarigi al vi ke, ĝenerale, la informoj ricevitaj en okcidentaj landoj pri la stato, sinteno kaj intenco de GDR estas intence torditaj fare de oficialaj (kaj neoficialaj!) instancoj. Pro tio mi tre aprezas rektain informojn kiuj permesas starigi pli objektivan opinion.

Chr. Declerck, Antverpen, Belgio

La broŝuro „La germana popolo kaj U.N." nepre havas grandan klarigan kaj instruan utilon. Mi devas konfesi, ke ni eĉ ne sciis, ke Germanujo ne apartenas al U.N. Mi opinias apartenon al U.N. tiel memkomprenebla afero ke mi kredis ke almenaŭ ĉiuj Eŭropaj landoj estas membroj de tiu organizaĵo.
Estas bone rememori pri la intermondmilitaj okazaĵoj kaj cirkonstancoj. Precipe la plu junaj pri tio ne multe scias.

Verkoj de Lenin en Esperanto

Omsk: Du verkojn de Lenin, i. a. *„Kio estas soveta potenco?"* esperantistoj en Siberio tradukis esperanten honore al la 100-naskiĝtago de la unua ŝtatestro de Sovetunio. Estu menciite, ke la proletara Esperanto-eldonejo EKRELO en Leipzig 1933 volis eldoni la unuan el la planitaj 16 volumoj de elektita verkaro de Lenin. La faŝismo malhelpis la realigon de tiu plano. La manuskriptoj ĝis hodiaŭ ne estis retrovitaj. Kiu ion scias pri ili?

Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj

La direktoro de la esperantaj elsendoj de pola radio sciigas nun, ke la redakcio denove posedas stokon de eldonaĵo *„Polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj"*. La broŝuro estas senpage havebla ĉe la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando.

Turisma Seminario de PEJ

Dum la V-a Internacia Esperanto-Ferio en Miedzygórze (okazonta de la 16-a ĝis la 29-a de septembro) okazos ankaŭ Seminario de PEJ. La temo estos „Turismo" kaj konsistos el dek prelegoj kun diskutoj pri jenaj temoj: „Scio pri Pollando", „Junulara Turismo" kaj „Zamenhof- kaj Esperanto-trakoj en Pollando". Oni planas prilaboron de gvidlibro pri la Esperanto-movado en Pollando.

Internacia konstanta komitato por agnosko de GDR

Konforme al la rekomendo de la internacia konferenco pri „La signifo de la agnosko de GDR por la eŭropa sekureco“, okazinta la 8-an kaj 9-an de Junio 1968 en Helsinki, la 15-an de Februaro 1969 en la sama urbo konstituiĝis „Internacia Komitato de la Konferenco en Helsinki“. Laŭ la komunikaĵo ĉeestis reprezentantoj el 13 eŭropaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finlando, Francio, Germana Federacia Respubliko, Italio, Cipro, Luksemburgo, Nederlando, Svedio, Germana Demokratia Respubliko. Kiel estro de la komitato estas elektita s-ro *Stellan Arvidson,* Svedio. Vicestroj estas s-ro *Olavi Saarinen,* Finlando, s-ro ministro *Henri Rodin,* Belgio kaj s-ro d-ro *Paul Wandel,* GDR.

En la finkomuniko tekstas: „La membroj de la komitato konsideras, ke depost 20 jaroj ekzistas du germanaj ŝtatoj, kaj ke la agnosko de GDR estas konfirmo de la realeco. La komitato prenas sur sin la taskon, surbaze de la alvoko kaj la rezolucio, deciditaj de la konferenco en Helsinki, konvinki la publikon per multspecaj iniciatoj pri tio, ke la agnosko de GDR estas necesa kiel decida kontribuo al la sekureco en Eŭropo.“

(El „Faktoj kaj opinioj“ 2/69)
Trad. R. Rabenalt

Juĝu mem:

Proksimume je la sama tempo fine de 1968 okazis en okcidenta Berlin kaj en la ĉefurbo de GDR, Berlin, procesoj kontraŭ iamaj faŝistaj krimuloj kontraŭ la humaneco.

En okcidenta Berlin estis akuzata la juĝisto de la iama plej alta faŝista juĝistaro (t.n. „popoljuĝistaro“) Rehse. Oni pruvis al li 231 murdojn. La juĝo estis:

m a l k o n d a m n o .

Antaŭ la 1a punsenato de la urba juĝejo de Grandberlin staris la gardisto en la iama Gestapo-malliberejo „Malgranda Fortreso Terezin“, Wachholz. Al li oni pruvis 322 murdojn kaj la partoprenon ĉe almenaŭ 183 ekzekutoj de diversnaciaj patriotoj. La juĝo estis:

k o n d a m n o a l m o r t o .

La juĝoj estas tiel kontraŭecaj kiel la sociaj cirkonstancoj en la disigita urbo. En okcidenta Berlin same kiel en okcidenta Germanio la nazikrimoj restas nepunitaj. En GDR ne estas indulgataj la militaj kaj kontraŭhomecaj krimuloj, ĉar neniam plu devas disvastiĝi de germana teritorio tiaj krimoj.

Rim.: Gestapo = faŝista sekreta ŝtata polico.

(El „Nova hejmo“ 1/69)
Trad. R. Rabenalt

Evoluo kaj ago de socialisma personeco dum scienc-teknika revolucio (IV kaj fino)

„Unu el la sekvoj de la scienc-teknika revolucio, plejfunde reliefigi la vivon de la individuo estas la neceso, ke ĉiu laboro iom post iom pli estu ero de kolektiva laboro. Ankoraŭ ekzistas multaj homoj, kiuj konsideras aŭ deziras konsideri tiun ĉi fakton kiel anoniman masigon kaj fine kulturan pereon kontraŭindividuan. Sed fakte kolektiva laboro tute ne postulas senvalorigon aŭ senindividuigon de persona laboro, ĉiukaze ne por tiu, al ties vivkonscio apartenas la volo fari ion de vera valoro socia. Labori en kolektivo ja ne signifas, ke pluraj homoj faras la saman kaj ke unu plibonigas la fuŝlaboron de aliu. Labori en kolektivo signifas ĉiam dividi la laboron en veraj taskoj por ĉiu unuope, sed ĉiam ligita kun konstanta kontrolo de la rezultoj, kian oni mezuras je la uzebleco por la taskoj de la alia. Tio tute ne signifas redukton de responso de l'individuo, sed kontraŭe; de la solideco de la laboro de unu ja ankaŭ dependas la sukcesoj de la aliaj. Kio el tio rezultas, ja estas multe pli, ol la partoprenantoj povus krei per sola laboro. La laboro de ĉiu individuo ja ĉie enestigas la tuton kaj garantias ĝian valoron. Bazante sur veraj sukcesoj ĝi donas memkonfidon al ĉiu partoprenanto de la rezulto, ĉu laboristo, inĝeniero, teknikisto, sciencisto, instruisto aŭ kiu ajn.

Ekzemplon de laboro, kiu nur eblas per kunago de multaj cerboj, mi volas citi mallonge. Hodiaŭ oni tre ofte parolas pri prognozo, pri laboroj, kiuj helpas al ni klarvidi tion, kion ni povas atingi post 15 aŭ 20 jaroj, pli bone ol nura plipolurigo de la nuntempo evoluo eblas. Sed se ni ankaŭ ne volas trotaksi la valoron de detaloj, sciante jam hodiaŭ pri la estonteco: tia kunlaboro pri tasko etendiĝanta malproksime ĝis al la estanteco kun ĝiaj multflankaj interplektoj, devigas ĉiun solulon al ekzakta pripenso, pri la ebla estonteco kaj tial kondukas al viva konscio pri eblecoj efiki kaj al responso de individuo en nia socio: ĝi ankaŭ kondukas al preteco kunlabori pri estontaj taskoj sociaj laŭ spertoj. Tio valoras kaj efikas.

Vera kunlaboro je sociaj taskoj, plie trans la malvastan terenon de propra faklaboro ĉiam formas nian pensadon kaj niajn taskojn, ja ĝi povas ebligi komprenon por multo nova en nia ordo, kiu antaŭe restus nekomprenebla. Ĝi faras memkomprenebla aliflanke multon, ke spertulo tute ne konscias pri malfacilaĵoj, kiujn devas venki novulo. Por ĉiu tereno de nia aktivado validas, ke ĝi vere nur estas ebla kaj sencplena per trezoro de faka aŭ viva spertoj akiritaj per kunlaboro lernante. Ni ĉiu lernas la malpaciencon de la junularo, kiu jam emas efiki per entuziasma aktiveco, ofte eĉ sen propraj spertoj, sed laŭ bona intenco plenumi ion. Se oni permesus al ili agi laŭplaĉe, tiam povus lernanto sen la spertoj de majstro ruinigi rapide ekzemple multvaloran ilarmaŝinon. Kompreneble estus sensence nur rifuzi la intencojn de sensperta junularo, iam ĝi ja devos pli scii pri multaj aferoj ol ĝiaj nunaj instruantoj. Sed ni ne devas permesi, ke tiamaniere detruiĝas io de valoro, tio validas ĉie, ne nur por ilarmaŝinoj, sed antaŭ ĉio por nia socia vivo. Kiu akiris per socia kunlaboro la fundamenton de nia ordo kiel viva posedaĵo, ĝuas nian konfidon.

Sed kiu restis flanke kaj tamen volas aliigi, ne ricevos la eblecon de ni. Tio ne estas obstina reguligado, sed antaŭkondiĉo por vere krea kunlaboro. Oni nur ekscias tion per spertoj el propra laboro. Kreanteco ĉiam estas krei ordon, kaj tial precize la kontraŭo de anarkio. Ni scias tre bone, kio gravas speciale rilate nian nacian dividon kaj ni kontraŭas la malordon jam en la komencoj, ankaŭ se ĝi prezentiĝas alloge. Ni tute ne estas jam kontentaj pri rezultoj atingitaj ĉe ni. Sed niaj homoj spertis kaj ne forgesis, ke nia tuta prospero elkreskiss el propra laboro peniga kaj honesta, sed neniam el niaj dezirrevoj aŭ el allogigoj de niaj malamikoj — ĉiam nur el propra kunlaboro kaj laboro je si mem. Nur tiu ĉi vojo kondukas en nia socio al vera socialista demokratio. Tion komprenis niaj homoj; tio montriĝis nun per la akcepto kaj konsento pri nia nova konstitucio.

Okcidentaj observantoj nun ofte devas konstati kun mirita nekompreno, kiel forte solidiĝis la memkonscio de niaj civitanoj dum la lastaj jaroj: jen estas la decida kaŭzo por tiu ĉi evoluo. Sekve ne estas utopio, se ni atendas, ke venkas nia ideo pri personecaj valoroj — per lerno, pripenso kaj antaŭ ĉio per kunlaboro."

(El parolado de Max Steenbeck dum la VIIa kongreso de Germana Kulturligo)

Trad. R. Hahlbohm

Grava evento: Libro pri GDR en Esperanto!

Ĵus aperis en Esperanto lukse ekipita libro kun la titolo „*Germana Demokratia Respubliko, bildoj kaj faktoj*". Tiu unika libro prezentas sur 256 paĝoj la plej gravajn informojn pri la 20-jaraĝa Germana Demokratia Respubliko. Vere bona kaj digna naskiĝtaga donaco de la eldonejo Zeit im Bild en Dresden. Ilustrita per pli ol 50 nigra-blankaj, 27 koloraj fotoj kaj multaj tabeloj, mapoj kaj desegnaĵoj la libro donas al ĉiu ion. Jen la ĉefĉapitroj: Historio, socia vivo, ekstera politiko, ekonomio, agrikulturo, trafiko, popola klerigado, sanprotektado, ferioj kaj ripozado, kultura vivo, sporto. Je la fino de la libro sekvas konciza priskribo de la 15 distriktoj de GDR. Ĉiu eksterlanda esperantisto certe volonte havigus al si tiun multflankan kaj interesan libron. Ili ĝin mendu ĉe Centra Laborrondo Esperanto, DDR — 108 — Berlin, Charlottenstraße 60.

Kreskis socialisma amikeco

Memoroj okaze XXV-jaroj Pola Popola Respubliko
de komerca konsilisto Rudi Graetz

Kiam mi estis knabeto, ankoraŭ ne vizitinte la lernejon, dum unua fojo en mia vivo mi konatiĝis kun poloj. Ili laboris kiel sezonaj laboristoj ĉe la grandbienuloj dum aŭtuna rikolto en imperiisma Germanio por ege malalta salajro kaj sub malbonaj vivkondiĉoj.

Dum somero mi vivis ĉe miaj geavoj en Schwerin (ŝverin), la tiama ĉefurbo de la lando Meklenburg. Dum ĉiu dimanĉo la polaj falĉistoj venis en la urbon por aĉeti ion nepre necesan ĉe la butikisto, kies vendejo troviĝis ĉe angulo de unu el la ĉefstratoj. Miaj geavoj, kiuj ankaŭ laboris kiel rikoltaj laboristoj tagnokte kaj neniam fariĝis riĉuloj, rakontis al mi pri la ankoraŭ pli malfacila vivo de la polaj kamplaboristoj. Tiamaniere ili jam vekis en mi simpation por polaj homoj.

Kiam mi fariĝis jarojn pli poste junula senlaborulo, mi mem vizitis la domaĉojn, en kiuj la polaj laboristoj dum la sezono devis vivi sur la bienoj, por diskuti kun ili pri politikaj demandoj kaj vendi al ili komunismajn broŝurojn kaj gazetojn en pola lingvo.

Pluan fojon en mia vivo mi konatiĝis kun polanoj dum la dua mondmilito. Kiel germana ŝtatano la faŝistoj devigis min 1942 esti soldato en germana „Deutsche Wehrmacht“ (Germana Defendforto), samtempe ankaŭ devigante polanojn kiel tielnomataj „Volksdeutsche“ (Popolgermanoj) al la sama servo. Dum 1943 „nia bataliono“ troviĝis en Danio en la urbo Vordingborg. En mia kompanio troviĝis „Gefreiter“ (subulo de suboficiro), kiu parolis la germanan lingvon, kvazaŭ li estus naskita germano, sed lia koro nur batis por Polio. Komuna al ni ambaŭ estis la malamo kontraŭ la Hitlera faŝismo, kaj komune ni ankaŭ agis ĝis la jaro 1945.

En printempo 1943 venis al nia bataliono novaj rekrutoj. Ili estis tielnomataj „Volksdeutsche“ (Popolgermanoj) kaj la hazardo volis, ke ni ambaŭ povis savi la vivon de unu el ili. Nia kompanio troviĝis en lernejo en alia urboparto de Vordingborg ol la bataliono Res. Füs. Bat. 202, kio troviĝis en dana kazerno en kontraŭa parto de la urbo. Iutage mi devis tien iri por reguli monaferon. Subite vokis min leŭtenanto, kiu tagon antaŭe novalvenis en Vordingborg al nia kompanio. Tie li konatiĝis kun mi anoncante sin en la skriboficejo. Li nun ordonis, al mi, ke mi skribu protokolon pri eldiroj de ĵus arestita rekruto. La rekruto estis unu el la tielnomataj „Popolgermanoj“ el Polio. Dano, al kiu li diris sian opinion pri la Hitlerfaŝismo, denuncis lin tiamaniere, ke mortpuna verdikto estus certa. Feliĉe dum la protokolado mi eksciis la nomon kaj adreson de la dana denuncinto kaj mi tial povis sciigi ĝin al la pola „Gefreiter“, kiu nun „ekagis“.

Post kelkaj monatoj, kiam ni por kelkaj tagoj troviĝis por militekzercado en kamptendaro, mi subite vidis la „arestitan rekruton“. Li revenis al nia kompanio, libera, ĉar la denuncinto dum la proceso „ĵuris“, ke li ne estas certa, kion la polo vere diris, ĉar nek li bone komprenas la germanan lingvon nek la polano. Tio signifis liberigon por la „Popolgermana“ rekruto.

Fakte la dana denuncanto reprenis siajn denuncajn vortojn, ĉar li sciis, ke la morto estus certa por li, se la polo estus mortpunata.

Pliaj renkontiĝoj okazis kun polaj Kamaradoj jam sub por ĉiuj pli feliĉaj cirkonstancoj post la dua mondmilito en eksterlando. Cu en Islando, ĉu en Danio aŭ aliaj nesocialismaj landoj, ĉie kie ni renkontiĝis, ni kiel bonaj amikoj kune laboris en la intereso de niaj socialismaj landoj. Kreskis inter ni la socialisma amikeco.

Restas nur ĉe mi la deziro, trovi la libertempon foje ankaŭ viziti Polion mem, la patrion de miaj amikoj kaj la bonan kaj socialisman najbaron de GDR, kiu dum tiu ĉi jaro festas la 25an datrevenon.

20 jaroj nun ekzistas GDR. Ne plu ekzistas grandbienuloj, kiuj povas ekspluati nek polajn nek germanajn kamplaboristojn. La laboristoj en niaj socialismaj landoj nun mem rikoltas, kion ili semas.

Ekzistas en la germana lingvo nocioj, kiujn la infanoj de GDR ne plu povas kompreni. Kiam unuafoje mi rakontis al miaj infanoj pri la primitiva kaj mizera vivo de iamaj germanaj kamplaboristoj, subpremitaj kaj ekspluatitaj ĝis 1945 de la germanaj grandbienuloj, ili demandis mirigite: „Kial la kamplaboristoj toleris tion?“

Niaj infanoj ne scias, kio signifas esti servulo. Ili ne konas la dependecon de servistoj de siaj „sinjoroj“. Esprimoj kiel „sinjorina moŝto“, bienulo, regantoj kaj regatoj, ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, superuloj kaj subuloj, malriĉuloj, klas-aroganteco ktpl. por niaj infanoj, nur ankoraŭ estas historiaj nocioj.

Sed ankoraŭ ekzistas ekspluatuloj en okcidentaj landoj, kiuj ankaŭ danĝerigas niajn atingaĵojn, ne nur en GDR, sed ankaŭ tiujn en Polio kaj aliaj socialismaj landoj. Per ĉiuj rimedoj ili provas kaj ankaŭ per tre lertaj politik-ideologiaj metodoj ili klopodas reakiri la potencon en niaj landoj, por denove subjugi la laboristojn kaj kamparanojn kaj ekspluati ilin profitcele.

Des pli multe mi ĝojis, kiam tre konsekvence la pola popolo sub la lerta gvidado de la Pola Komunista Partio rebatis la malamikojn, kiuj provis ideologie influi la homojn. La imperiismaj fortoj, speciale ankaŭ la okcidentgermanaj ricevis senteblan frapon de la pola popolo.

Tio videbliĝis ankaŭ klare dum la polaj balotoj, kiuj okazis dimanĉon, la 1an de junio 1969. La bona rezulto ne nur signifis la malsukceson de ĉiuj kontraŭsocialismaj fortoj, sed ankaŭ grandan malvenkon de la imperiismaj globalstrategoj, kiuj per siaj aĉaj propagandaj kanaloj, kiel ekzemple la sendilo „Libera Eŭropo“ sensukcese klopodis influi la polan popolon. Sed ĝi ankaŭ estis sentema malvenko por la revenĝemaj okcident-germanaj politikuloj. Jen citaĵo el la ĵurnalo „Neues Deutschland“ de la 4a de junio 1969:

> „La balota venko de dimanĉo demonstras, ke Popola Polio je la antaŭvespero de sia 25a jartago estas pli firme ligita al la socialismo ol antaŭe. Sen lasi sin erarigi ĝi daŭrigos sian kurson, kiu garantias la sekurecon de Polio kaj la netuŝeblecon de siaj limoj kaj eternigas kaj fortigas la fratan amikecon, la kunlaboron kaj la ligon inter Polio kaj la Sovetunio kaj la aliaj membrolandoj de la Varsovia Pakto — kiel Wladyslaw Gomulka substrekis dum balotmanifestado en Varsovio.“

Dum unuafojo en sia historio Polio havas ĉe sia okcidenta limo amikan najbaron, aliancano, pacama germana ŝtato, la Germanan Demokratian

Respublikon. Kaj tiu ĉi okcidenta limo de Polio estas definitiva. Ĝi estas sigelita per la subskribo de la kontrakto de Zgorzelec, per kio GDR donis ekpuŝon por vera „Nova germana orienta politiko“ per faktoj kaj ne per vortoj.

Ni scias, ke la komuna strebado de ambaŭ ŝtatoj al socialismo firmigas la amikecpakton inter niaj popoloj, la plej bona fundamento por ĉiam pli granda alproksimiĝo de niaj ambaŭ ŝtatoj — la Popolrespubliko Polio kaj la Germana Demokratia Respubliko.

Dum la lastaj dudekkvin jaroj ŝanĝiĝis la vizaĝo de Polio. Grandaj estas la progreso kaj la sukcesoj de la lando. La Pola Popolrespubliko havas bonan nomon en la mondo.

Certe ankaŭ la polaj esperantistoj kontribuis sian parton ĉe la fortigo de la Pola Popolrespubliko. Ĉiuj Esperantistoj en la tuta mondo scias pri la disaŭdigoj de la Pola Radio per Esperanto kaj multaj esperantistoj regule aŭskultas la programojn.

Mondfamaj ankaŭ estas la esperanto-semenarioj en Polio kaj la ĉiujara renkontiĝo en Miedzygorze.

Per helpo de Pola Radio antaŭ nelonga tempo mi ricevis la libron: *„Pollando 1944—1964“*. Ĝi estas represaĵo de la malgranda pola enciklopedio. Kun granda intereso mi legis la libron kaj mi devis konstati, ke la sukcesoj de Polio ĝis la jaro 1964 estis multe pli grandaj ol mi ĝis nun pensis. Kiom pli grandaj ili nun devas esti en la 25a jaro de la Pola Popolrespubliko.

Same interesa estis por mi kaj certe ankaŭ por multaj aliaj eksterlandaj esperantistoj la libro de *Tadeusz Derlatka kaj Józéf Lubojański: „Polaj Okcidentaj kaj Norda Teritorioj.“* Kaj kiu ne konas la belajn klasikajn librojn de *Henryk Sienkiewicz „Quo vadis?“* kaj *Boleslaw Prus „La Faraono“*, kiuj ankaŭ aperis en Esperanto?

Per tiuj kaj similaj verkoj la Pola Literaturo konatiĝis en landoj, kie ne ekzistas traduko en la koncerna nacia lingvo.

Al la polaj esperantistoj ni deziras pluajn bonajn sukcesojn en ilia laboro kaj al ilia Patrio, la Popolrespubliko Polio, plifortigon kaj rapidan progreson kaj evoluon. Vivu la amikeco inter GDR kaj PRP!

Polaj esperanto-eldonaĵoj-nepre legu ilin!

Andrzej Pettyn: „Esperanto-konversacioj, 3 vol. 350 pĝ.

Irena Jablonska: „La ebria muso“, 35 pĝ. originalaj fabeloj

Roman Dobrzynski: „Kantante tra Pollando“, 55 pĝ., polaj kantoj kun notoj

Boleslaw Prus: „La Faraono“, 960 paĝoj, trivoluma, fama verko de la mondliteraturo

Julian Tuwim: „Poeziaĵoj“, 130 pĝ., originalaj poemoj

Antoni Grabowski: „Nova antologio“, 31 pĝ., novelaro de klasikulo esperanta

Kazimierz Brandys: „Kiel esti amata“, 57 pĝ., novelo pri tragika virina sorto.

Mendu ĉe Karl-Marx-Buchhandlung, 1017 Berlin, Karl-Marx-Allee 78/84!

La Monda Asembleo por la Paco en Berlin

Delegitaro de MEM oficiale partoprenis

La 15-an kaj 16-an de februaro 1969 okazis en Berlin grava konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de 20 internaciaj organizaĵoj. Inter ili troviĝis la *Mondpaca Esperanto Movado*, reprezentita de ĝia fondinto kaj nuna centra administranto de MEM s-ro *Anton Balague* el Aŭstrio.

La partoprenantoj de tiu konferenco decidis, ke la 21-an ĝis 24-an de junio 1969 okazu Monda Asembleo por la Paco. Oni eliris de la konvinko, ke neniu pacorganizo aŭ -movado sole povas mobilizi la gigantan potencon de la publika opinio; kiu povas influi la evoluon de la eventoj, kondukanta la homaron for el la nuntempa diabla cirklo de la internacia streĉiteco.

La *Mondpaca Esperanto Movado* aktive kaj plenforte partoprenis la preparlaborojn por tiu laŭ sia speco unika internacia Asembleo. Ĝi okazis la 21-an ĝis 24-an de junio en Berlin, kiel planite. La atendoj plej optimismaj estis grave transiritaj de la realeco. En la mondo ankoraŭ neniam estis organizita tia vasta kaj internacia renkontiĝo de 56 internaciaj kaj 320 naciaj organizoj el 101 landoj. Ili reprezentis plej diversajn ideologiojn kaj politikajn opiniojn. Sed kunligis ĉiujn la sama deziro al sekurigo de la paco. Oni laboris en 5 laborkomisionoj, kiuj subdividiĝis jene: Vjetnamio; eŭropa sekureco; Proksima Oriento; koloniismo, novkoloniismo kaj nacia sendependo, senarmigo.

Mondpaca Esperantista Movado partoprenis la Asembleon por la Paco per 8 delegitoj el 8 landoj. Estis jenaj personecoj: *Nikola Aleksiev*, prezidanto de MEM kaj de Bulgara Esperanto Asocio; *Tomaś Balda*, prezidanto de la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio *Anton Balague*, la centra administranto de MEM, Aŭstrio; *Konstantin Mihajlovič Gusev*, vicprezidanto de la soveta MEM-sekcio; *Rudi Graetz*, prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto de GDR en la Germana Kulturligo; *William Gilbert*, centra redaktoro de „Paco", Francio; *s-ro Konsiniak*, vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la pola MEM-sekcio kaj *d-ro Lajos Marton*, prezidanto de la hungara MEM-sekcio.

Krome partoprenis la Asembleon islanda esperantisto.

La MEM-delegitaro aktive kunlaboris en la komisionoj kaj ankaŭ havis la eblecon alparoli en la plenkunsido la pli ol 1200 delegitojn de la monda renkontiĝo. Per ilia konkreta kunlaboro en tiu grava internacia kongreso la delegitoj montris, ke MEM ne izoliĝas de la mondaj eventoj sed kontraŭe, volas aktive partopreni la internacian batalon por la paco. Kompare kun aliaj internaciaj organizoj MEM reprezentiĝis per digna, laborkapabla kaj relative forta delegacio kaj ĝuis plenan samrajtecon kaj bonan prestiĝon dum la kongreso. Sendube tiu aktiva partopreno kaj kunlaboro por la paco estis la plej bona propagando por Esperanto.

(Pluaj raportoj pri la Asembleo sekvos en la sekvonta numero)

Husen Muhammed Al-Amili, Bagdad

Irako kaj GDR — du amikaj ŝtatoj

Pro siaj longaj nigraj spertoj kun la imperiistoj, la arabaj popoloj pli kaj pli rekonas sian precizan pozicion en la monda lukto. Ili rekonas, ke iliaj naciaj interesoj fakte kuŝas je la flanko de la kontraŭimperiisma fronto — la fronto de la popoloj, kiuj luktas kontraŭ la monda imperiismo. Ni konstatas, ke la socialismaj landoj, kiuj multe suferis kaj ege oferis en la vojo de popola luktado, ĉiam staris je la flanko de la popoloj, kiuj simile luktas por naciaj aspiroj kaj subtenis tiujn aspirojn per grandaj moralaj kaj materiaj helpoj. Grandparte proparte pro tiu frateca helpo, multaj aziaj popoloj sukcesis sekuri nacian suverenecon kaj ili plene evoluas siajn naciajn amiciojn.

La germana popolo, kiu dolore suferis pro la imperiismaj avidoj dum du mondmilitoj, fine sukcesis starigi sur sian teron paceman, justan kaj progreseman popolan regadon. La imperiistoj ne plu povas libere agi por misuzi la germanan popolon por siaj avidoj. Potenca fortikaĵo de paco do leviĝis per la establo de la Germana Demokratia Respubliko, per kiu fortiĝis la monda popola fronto kontraŭ imperiismo, faŝimo kaj ŝovinismo.

La malnova imperiismo kaj la nova, kiu levis sian kapon, precipe nuntempe en Okcident-Germanio, kaj la Zionismo, kiu invadas la arabajn landojn kaj provas ĉiutage terorigi la arabajn popolojn per agresemaj militaj agoj — ĉiuj ĉi estas fakte partoprenantoj en agreso kontraŭ la arabaj popoloj. Tio kulminis per la 1967-a agreso de tiuj nigraj potencoj, kiuj armis kaj uzis la Zionisman ilon kiel lancokapon kontraŭ la arabaj popoloj.

La arabaj popoloj povas ja bone rekoni la malamikojn kaj la amikojn. La Germana Demokratia Respubliko estas amika lando, kiu ĉiam subtenis la leĝajn ambiciojn de nia popolo kaj funkciigas kun nia lando pacemajn kaj reciproke utilajn rilatojn jam ekde dekunu jaroj. Dum trisemajnoj da lerta observado en GDR, kiam mi unue vizitis la landon en 1961, mi kiel arabo, bone komprenis, ke la ŝtato de GDR ja estas nia natura kunliganto kaj amiko-lando. Aliflanke, oni jam ekde tiam povis klare rimarki, ke la alia germana ŝtato, kiu subtenis Zionismon per malavara helpo kaj kunlaboris kun la franca imperiismo en Alĝerio, agas neamike al ni.

La plena diplomatia agnosko de Germana Demokratia Respubliko flanke de nia lando, la Respubliko de Irako, estas unuloke rekono de eminenta konkreta fakto, la ekzisto de la sendependa suverana ŝtato de GDR. Tiu ŝtato jam ekde 20 jaroj, okupas elstaran mondan pozicion, civilizacie, industrie kaj politike. La ŝtato de GDR kondukas, jam ekde sia naskiĝo, paceman mondan politikon kaj estas fortega muro kontraŭ iuj ajn novaj faŝismaj konspiroj en Eŭropo. Due, dum nia lukto por libereco kaj sendependo, nature ni deziras solidigi nian kunlaboron kun aliaj amikaj samcelaj landoj. Kaj tial, ĉar nia ŝtato restas ankoraŭ en la unua stadio de nacia evoluo, certe ni bezonas la fratecan helpon de la alte evoluinta amika ŝtato de GDR.

Tian helpon detenis de ni la monda imperiismo, kiu regadis, kaj ankoraŭ regas kelkajn arabajn landojn nun jam dum 200 jaroj.

Nia lando estas treege riĉa per

grandegaj kvantoj kaj rezervaĵoj da krudmaterialoj de petrolo, sulfuro, fero kaj aliaj metaloj kaj subteraj mineraloj, kiuj estas ankoraŭ ne ekspluataj. Ni havas du el la plej grandaj riveroj de la mondo, Tigreso kaj Eŭfrato, kiuj disigas unu el la plej produktemaj valoj de la mondo, la Valo de la Du Riveroj. Tiu Valo estis la lulilo de la unuaj civilizacioj kaj poste vidis multajn grandajn prosperajn civilizaciojn, kiuj ĝisnune influas la vivon de la homaro.

Niajn riĉaĵojn nuntempe aŭ rabas la imperiistoj aŭ ili kuŝas netuŝitaj subtere. Niaj abundegaj akvoj malŝpare fluas en la maron aŭ, kiel nuntempe okazas, sezone detruas niajn kamparojn per inundoj de la du riveroj. La nuntempa loĝantaro de nia lando estas nur 7,5 milionoj kompare al 30 milionoj en la ora epoko de Bagdado antaŭ mil jaroj. Tiam ĉiuj ebenaĵoj estis verdaj, sed nun blovegas ŝtormoj da sablo kaj fluegas detruantaj torentoj. Oni taksas, ke la realigo de la nuntempaj irigaciaj planoj ebligos nian landon nutri loĝantaron de 70 milionoj. La imperiistoj ne volis helpi al ni tiurilate, sed permesis al ni nur minimuman evoluon.

Kun nia nacia Revolucio de la 14-a de Julio 1958, nia popolo paŝis grave antaŭen. Nia popolo detruis la reĝan reĝimon, kiu estis kunliginto de imperiismo. Poste ni naciigis gravajn ekonomiajn sekciojn kaj fremdajn bankojn. Laŭ ekonomiaj kontraktoj kun Sovet-Unio, ni komencas kelkajn utilajn industriajn projektojn, ekzemple por mekanikaj iloj, medikamentoj kaj nutraĵoj. Antaŭenlonge, la amika Pollando entreprenis helpi al ni ekspluati nian sulfuron. Ni esperas, ke per la antaŭenlongaj ekonomiaj kontraktoj kun la amika ŝtato de GDR, kelkaj aliaj gravaj industrioj en nia lando baldaŭ ekfunkcios.

Feŭdalismo ne plu ekzistas en nia lando. Ni jus nuligis la kompencaĵojn al eks-feŭdalistoj, kaj do niaj kamparanoj nuntempe tute leĝe posedas la teron por si mem. Tamen, ili ankoraŭ devas lerni kiel organizi la kamparojn en modernajn kolektivajn komunumojn, ekzemple kiel tiuj nuntempe funkciantaj en GDR.

Nia popolo estas konvinkata, ke la amika suverena ŝtato Germana Demokratia Respubliko samgrade havas la deziron etendi al ni la manon de frateca helpo, kiun nia popolo nepre bezonas. Nia popolo jam tediĝis de la mensogoj de la imperiistoj pri pretendata helpo kaj ni do volas komenci konkretan kunlaboron kun niaj fidelaj amikoj, kiujn ligas kun ni, ne nure komercaj rilatoj, sed nepre samaj aspiroj por vere pli bona mondo da internaciaj paco kaj progreso kaj varma amikeco inter ĉiuj popoloj de la mondo. La suverena ŝtato de GDR kaj la Respubliko de Irako establas sian amikecon sur tiuj samaj celoj en monda politiko, kiuj sen iu ajn dubo fine venkos kaj tute plenumiĝos. Do vivu la komuna luktado de la arabaj popoloj kaj la popolo de la Germana Demokratia Respubliko por popola libereco, monda paco kaj universala progreso.

Arabaj maksimoj

Valoro de ĉiu homo estas en tio, kion li faras.

La tempo frapos tiun, kiu fidas ĝin. Tiu, kiu malfidas ĝin, gajnos tempon.

Trad. H. Al-Amili

NAPALMO

Napalmo fariĝis nocio, kun kiu trudiĝas al la memoro bildoj pri dismorditaj vizaĝoj, korpoj, brakoj, gamboj de vjetnamaj infanoj. John Takman, sveda kuracisto, venis al la konkludo, ke ne sufiĉas la konscienca turmento ligita kun tio. La mondo devas ekscii, kio estas napalmo kaj kiu negocas per tiu ĉi terura detruilo.

„Preskaŭ neniam mi konis sendormecon. Sed . . . en la soleco mi ofte vekiĝis nokte kaj devis pensi pri la vjetnamaj vilaĝoj, kiuj ĝuste en tiu ĉi momento estis celoj al la artilerio de la Sepa Militŝiparo kaj al la napalmbomboj, fosforbomboj aŭ globaj bomboj de la usona aerarmeo“, skribas John Takman. Li ne volis kaj ne povis silenti, kaj tiel estiĝis la libro „Napalmo“. El ĝi oni ekscias per ekspertoj, ke malantaŭ la formuloj kaj nomoj NP_1, NP_2, „Supernapalmo“ kaŝiĝas detruilo, pri kies „pliperfektigo“ oni laboris dum jardekoj.

La facile bruligebla materialo, kies plej gravaj eroj estas benzino kaj aluminiaj sapoj, dismordis la homan karnon ne sufiĉe profunde kaj malrapide, kaj ĝi estis miksata kun aliaj substancoj, ĝis kiam ĝi estigis temperaturojn ĝis 3000 gradoj, plubrulis sur akvo kaj neĝo, ĝis kiam nek kirasŝtalo nek fero kontraŭstaris ĝin. La libro de John Takman devigas pripensi, kia estis kaj estas tia morto por vjetnamaj infanoj, virinoj, maljunuloj, viroj en Ben Tre kaj multnombraj aliaj urboj kaj vilaĝoj.

Kio do estis la biblia Sodom kaj Gomorrha kompare al Ben Tre en napalmpluvo?, oni demandas sin, kiam oni eksciis per John Takman, kio estas napalmo. Kaj oni demandas sin, kiaj homoj estas tiuj, kiuj „surmerkatigas“ ĉi tiun mortigan produktaĵon? Ankaŭ al tio la libro de Takman havas respondon. Ĝi citas usonajn monopolojn kaj entreprenojn kaj donas indikojn — tiom kiom ili trafiltriĝas malgraŭ sekretigaj disponoj — pri iliaj profitoj en la napalmnegoco. Unu el multaj de tiuj napalmproduktantaj entreprenoj estas la Nopco Chemical Co., 60 Briad Street, Newark, kiu en la unua duonjara 1965 plialtigis siajn profitojn je 90 procentoj dank' al la napalmkonjunkturo.

Ne estas sekreto, ke la okcidentgermana registaro apartenas al la plej volemaj kaj plej aktivaj helpantoj de la usonanoj en ilia milito kontraŭ Vjetnamio. Kiesinger, Brandt kaj aliaj plurfoje manifestis sian solidarecon kun Usono en tiu ĉi demando („La federacia registaro treege altestimas la usonan kontribuon al la defendo de la libereco en tiu ĉi parto de la mondo“, tion deklaris la nuna ĉefministro en aŭgusto 1967 rilate la usonan Vjetnamio-politikon). La usona flanko responde atestis al la federacia respubliko, ke ties kontribuo rilate Vjetnamion estas „la plej granda post tiu de Usono“ (Averell Harriman).

Tamen la okcidentgermana registaro provas ŝajnigi sin senkulpa, kaŝiĝi malantaŭ „humaneca helpo“, kiam oni postulas de ĝi klarigon pro ĝia subteno al la usona agreso. Ekzistas multaj pruvoj pri la Bonn-a kunkulpo je la sangoverŝo en Vjetnamio, ĉu estas ciferoj pri militistaj helpadoj por Saigono, pri la pormilitaj kreditoj por Washington en formo de la kompenso de devizoj. Sed pli informa ol ĉiu nombro eble ŝajnas esti la eksperimento, kiun realigis la okcidentgermana verkisto

Günter Wallraff.

Ŝajnigante sin kemifabrikanto, kiu evoluigis speciale malmultekostan procedon por produkti konsistan parton de la napalmo, sed pro konsciencaj kaŭzoj timis akcepti grandajn komisionojn de la usona armeo, li konsultis 23 ekleziulojn kaj teologojn. 19 el ili pli malpli kuraĝigis lin akcepti la negocon, kvankam ili sciis pri la teruraj efikoj de la napalmo. Unu el ili motivigis sian kuraĝigon per tio, ke ja temas ankaŭ pri la demando „komunismo kaj demokratio" kaj ke la usonanoj reprezentas la demokration. Ne estis voĉo de blindigita unuopulo, sed reflekso de klimato, en kiu konscio pri kontraŭkomunisma misio kaj „libera entreprenisteco" estas faratajl leĝo, de klimato, en kiu gazeto kun milioneldono, la „BZ" de Springer, skribis sur la kulmino de la eskalado: „Finfine senkompromisa milito, kiu ankaŭ ne plu haltas antaŭ fabrikoj, havenoj, irigaciaj instalaĵoj kaj akvobaraĵoj."

Sed estas ankaŭ aliaj opinioj — ili estu reprezentatoj per la voĉo de prof. Gollwitzer el okcidenta Berlino. Li deklaris: „Oni ne povas esti demokrato, ne levante sin kontraŭ la usona Vjetnamio-politiko kaj ĝia imperiisma deveno. Oni ne povas esti kristano kaj silenti pri la murdoj en Vjetnamio." Tiuj ĉi germanoj laŭtigas sian voĉon, ĉar cerboj en servo de la agresemuloj elpensas detruajn armilojn kontraŭ vjetnamaj virinoj kaj infanoj. Por ili estas kuraĝigo, ke civitanoj de la alia germana ŝtato, de GDR, en konformeco al la leĝoj kaj etik-moralaj normoj de sia ŝtato, disponigas sian krekapablon al la servo de la vjetnama popolo. Unu ekzemplo el multaj: Sciencistoj de la popolpropra entreprenejo Jenapharm evoluigis ŝprucigeblan kuracilon kontraŭ pernapalmaj brulvundoj. Estas simbola por la solidareca sento de la junularo de GDR, ke junaj laboristoj de popolpropra entreprenejo plurfoje laboris senpagite, por aldone liveri kalisterkon por la vjetnama tero dezertigita per la usonaj bomboj. Milionoj da GDR-civitanoj helpis al la vjetnama popolo en formo de mon- kaj objektdonacoj, ili liveras sangoplasmon kaj kompletigas per individua agado la solidarecajn aktivecojn efektivigatajn sur ŝtata nivelo. En GDR Vjetnamio — por uzi la parolon de *Nazim Hikmet* pri Hispanujo — fariĝis „parto de nia sorto".

(El „Berliner Brief" Nr. 6/69)
Trad. Dr. Karl Schulze, Berlin

LE TAN LOI:

SOLA VOJO

Ho, mi demandas: kie mia patro?
Oni respondas: inter la mortintoj.
Kaj mi demandas, kie mia panjo?
Oni respondas: ŝi estas murdita.
Kaj mi demandas: kie la edzino?
Oni respondas: kuglo ŝin traboris,
infan' ankoraŭ movis sin subkore.
Kaj mi demandas: kie nia domo?
Oni respondas: fajro ĝin bruligis.
Kaj mi demandas: kie la patrujo?
Oni respondas: ĝi jam dezertiĝis, —
jen flamas, jen kvietas la batalo
en lukto de vilaĝoj subjugitaj . . .
Kaj mi demandas: kien gvidas vojo?
Oni respondas min post larmoviŝo:
Por nia venko estas vojo sola:
venu kun ni kaj tiam estos paco!

(Tradukis: L. TARKONY)

RECENZO

Novelaro de laosaj aŭtoroj

Neo Lao Haksat-Eldonejo 1968, 127 p.

En tiu-ĉi broŝuro troviĝas 9 noveloj, verkoj de laosaj verkistoj-batalantoj, kiuj celas priskribi certajn aspektojn de la patriota rezistado kontraŭ la usona agreso.

„*Revenĝo*“ de Xieng Mouan estas vivovera rakonto pri la „kvartalo de rifuĝantoj“ (koncentrejo) de Tong So, kiun la lakeoj de Usono ofte distrumpedadis por trompi la publikan opinion.

„*Ham Foong kaj lia vilaĝo*“ de Thao Boun Lin temas pri gerilgrupo en vilaĝo Boue kaj sia gvidanto, la 26-jara Ĥam Foong. Kuraĝege ili liberigis grupon de arestitaj samvilaĝanoj el la manoj de la malamikaj rabosoldatoj. „*Reveno al la hejmtero*“ de Phay Boun raportas pri la fuĝo de du laoanoj el koncentrejo, al kiu la reakciuloj venigis ilin perforte por igi ilin rabosoldatojn. Sed iliaj travivaĵoj kontraŭe igas ilin geriloj.

„*La instruisto kun fusilo*“ de Thao Boun Lin. La popola liberiga armeo sendas la junan instruiston Ĉoum al la Ko-minoritatoj, kiuj timas malbonfarojn de la fantomoj se ili lernas legi kaj skribi. Pacience li venkas superstiĉon kaj analfabetecon.

„*Ŝtala batalanto*“ (de Kham Man) estas honora titolo, kiun akiris Thao Pong, ano de trupunuo, kiu fiaskigis kvar atak-ondojn de la U. S. Air Force. La batalo estas tre bilde priskibita.

„*La sovaĝa kokino*“ de Thao Boun Lin. Vi Seum aliĝis al la geriltaĉmento jam kiel eta knabino. La gerilanoj laŭdas ŝin per la familiara nomo „sovaĝa kokino“, ĉar ŝi ruze kaj kuraĝe jam per bomboj kaj grenadoj mortigis plurajn malamikojn.

„*Aniĝo al la gerilgrupo*“ de Xieng Mouan. Aĉaj gekomercistoj kaj falsa amiko de ili ekspluatas kaj turmentas orfon Ĥam Fa, ties malamo kreskadas, ĝis li iutage per helpo de gerilanoj sukcesas venki kaj kapti la perfidulon. Li nun mem aniĝas al la geriltaĉmento.

„*La filo el la Lao Sung-nacieco*“ de Thao Boun Lin. — Simpla filo de la popolo aniĝas la popolan liberigan armeon de Laoso. En sia unua memstara komando li sukcesas kun nur du kameradoj senarmiligi kaj milit-kapti trupunuon de pli ol 30 malamikaj soldatoj.

„*La gerilano de Nam Bac*“ de Kham Man. — Sieng Oun, rifuĝinte de deviga laboro por la reakciuloj trovas sian hejmvilaĝon forbruligita, ruinigita. Nur hazarde li renkontas gerilanojn en la arbaro. Kune kun ili li batalas kaj iutage sukcesas liberigi la koncentrejon de Nam Bac, kie estas kaptitaj ankaŭ sia novedzino kaj sia patrino.

Linde Heinze

RECENZO

Tra la liberigita zono de Laoso

Fremdlingva eldonejo, Hanojo — 1968. 53 p., 14 fotoj
Vjetnamaj ĵurnalistoj vizitis la liberigitan zonon de Laolando kaj raportas pri siaj kolektitaj impresoj.

La liberigita zono en la montoj kaj ĝangaloj de Laolando naskiĝis en la fajro de la patriota milito kontraŭ la francaj koloniistoj kaj luktas nun malindulge kontraŭ la usonaj agresantoj kaj ties lakeoj. Sub la gvido de Neo Lao Haksat la loĝantaro daŭrigas kaj la batalon kaj la ekonomian strebadon, laŭ la devizo „sin apogi esence sur siaj propraj fortoj".

La sukcesoj estas mirindaj. La vivnivelo senĉese plialtiĝas. La bazaj bezonoj kiel nutraĵoj, ŝtofoj, medikamentoj estas kontentigitaj. Ŝtataj magazenoj interŝanĝas la arbarajn kaj agrikulturajn produktojn kontraŭ ŝtofoj, hejmilaroj, salo, petrolo, papero ktp.

Neo Lao Haksat instruis la kamparanojn rikolti someran rizon kiel dua rikolto. Antaŭe ekz. al la familio Xen Kham mankis nutraĵoj ses monatojn ĉiujare. Nun pojare ili rikoltas popersone 470 kg da rizo, kvanto sufiĉa por la ĉiutaga konsumado kaj eĉ la distilado de iu alkoholaĵo kiu „bruligas al vi la gorĝon". Ĉiu vilaĝo kotizas libervole „rizon por la nacia savo", ĉiu hejmo havas sian „rizvazon por la popolaj trupoj". La tuta popolo subtenas sian armeon.

La „patrino Dam Zi" ekz. bredas 5—6 porkojn kaj centojn da kortobirdoj por provizumi la soldatojn. Ŝi havas multajn adopt-filojn en la armeo kaj ĉiufoje buĉas porkon por festi novan adoptigon. Ŝi flegas malsanulojn kaj rifuzas iu ajn rekompenson.

La milico havas siajn kontraŭaviadajn grupojn. Lao-anoj, kiuj povis kalkuli sian aĝon nur per helpo de bambupecoj atakas nun kun sukceso ultramodernajn ajutaeroplanojn.

La popolkleriga movado estas tre forta. Laolando estas loĝata de pli ol sesdek naciecoj. 95 % estis analfabetoj. Sub Neo Lao Haksat ekestis unuaj alfabetoj por la diversaj naciecaj lingvoj. Ĉiu homo lernas, laŭ devizo „se vi konas unu plian literon ol via najbaro lernigu ĝin al li". Fonditiĝis pedagogiaj, profesiaj, agrikulturaj, medicinaj k. a. lernejoj. Krome oni luktas pacience kontraŭ la superstiĉoj kaj malbonaj kutimoj: opiofumado, monludo, prostitucio.

La publika sano estas unu el la plej ĉefaj zorgoj de Neo Lao Haksat. Nova kutimo en liberaj vilaĝoj estas la kolektiva higieno. La vilaĝoj havas kuracistojn, flegistinojn, farmaciistojn.

Por plibonigi la materian bazon oni starigis teksejojn kaj vilaĝajn forĝejojn. Lertaj teksistinoj iras en la montojn por instrui sian arton al aliaj virinoj.

Pli kaj pli da Lao-anoj agnoskas ke „estas nur unu vojo" kaj aliĝas la liberigitan zonon.

La raportoj de la vjetnamaj ĵurnalistoj estas rakontataj en vigla bonstila Esperanto. La broŝuro estas informriĉa kaj nepre leginda.

Linde Heinze

Rudi Graetz

La kontribuo de la esperantistoj por la fortigo de GDR (Fino)

Ĉiu grupo devas serioze ekzameni, kielmaniere ĝi povas plibonigi la efikan laboron speciale en la jaro de 20a jubileo de Germana Demokratia Respubliko per ripeta studado de la „Direktivoj por la agado de la esperanto-amikoj". Tiuj ĉi direktivoj donos bonan bazon por sukcesplena plua evoluo de nia nacia kaj internacia laboro.

Jen ekzemploj por konkretaj aludoj en la direktivoj:

Punkto 1

> *„- - - amika interŝanĝo de ideoj kun la esperantistoj de ĉiuj socialismaj landoj - - -"*

Jam multaj GDR-esperantistoj korespondas tiamaniere. Kaj sendube en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Polio ktpl. klaskonsciaj esperantistoj estas oftaj. Tamen kelkfoje ni devas konstati nesufiĉan scion pri GDR ne nur ĉe esperantistoj en kapitalismaj landoj.

Antaŭ nelonge rumana esperantisto vizitis longjaran amikon en GDR. Post reveno al Rumanio li skribis interalie, ke li kaj lia edzino antaŭe ne kredis, ke en GDR ekzistas tia alta vivnivelo.

La enhavo de tiaj esperanto-leteroj ankaŭ el kapitalismaj landoj ne nur estas interesaj por la grupo mem, sed ankaŭ por pli vasta publiko. Fabrikaj, lokaj kaj aliaj gazetoj volonte publikigas tiajn leterojn.

Ekzistas tradiciaj rilatoj inter la esperantistoj de Sovetunio kaj germanaj laboristaj esperantistoj. Kelkaj grupoj flegas tiajn malnovajn rilatojn kaj ankaŭ akiris novajn. La korespondado inter komitatoj kaj fabrikoj per Esperanto pli kaj pli evoluas. Tiaj rilatoj nun ankaŭ komencis evolui kun kaj per la esperantistoj en aliaj socialismaj landoj.

Punkto 2 alineo 1:

Unu el niaj ĉeftaskoj estas konvinke prezenti la evoluon de nia ŝtato por tiamaniere kunhelpi la fortigon de GDR, ankaŭ per tradukado de materialoj, dokumentoj ktpl. kaj sendi ilin al siaj leteramikoj. Ankaŭ ili havos eblecon publikigi bonajn kaj interesajn leterojn. Ĉiu respondletero estas grava. Utiligu ĝin ĉiam. Ankaŭ en la kadro de la Kulturligo.

Punkto 3

> *„La flegado de la mondlingvo estas por la esperanto-amikoj formo de ilia kultura agado, kiu povas kontribui al la ĉiuflanka klereco de socialismaj homoj."*

Jam ekzistas multaj bonaj ekzemploj de Vjetnamiaj vesperoj, Zamenhof-solenoj Kulturprogramaj Vesperoj kaj aliaj. Tamen necesas ankaŭ daŭrigi la plibonigon de la lingvoscio de niaj membroj kaj ankaŭ la utiligon de novaj instrumetodoj por komencantoj.

Punkto 4

„La esperanto-amikoj en la Germana Kulturligo rigardas la Germanan Demokratian Respublikon kiel modelon nacian kaj socialan por la formigo de la germana estonteco kaj kiel neskueblan bastionon de la paco en Germanio. Per ĉiuj fortoj ili subtenas la ampleksan konstruadon de socialismo kaj la pacan politikon de nia ŝtato de laboristoj kaj kampuloj. En sia agado ili atentas la progresemajn tradiciojn de la iama Germana Laborista Esperanto Asocio kaj la spertojn, kiujn la anoj de ĉi tiu asocio kaj aliaj amikoj de Esperanto akiris en la batalo kontraŭ faŝismo kaj dum la demokratia kaj socialisma rekonstruo.“

En konekto kun la jam antaŭe dirita tre grava estas la sistema esploro de la tradicioj de la laborista esperanto movado kun helpo de historiaj institutoj.

Punkto 5 b

„Traduko de paroladoj de gvidantaj politikistoj, de interesaj artikoloj kaj de publikaĵoj de verkistoj, de raportoj el ĵurnaloj kaj gazetoj taŭgaj por uzo en eksterlanda korespondado.“

En tiu rilato laŭ nia scio ĝis nun nur Centra Laborrondo efikis kun subteno de la distriktoj Karl-Marks-Stadt, Berlin kaj Dresden por „Paco“ kaj aliaj dokumentoj. Sed ankaŭ por niaj grupoj ĉi tie estos bona laborkampo. La tradukaĵoj povos esti multobligotaj kaj disponigotaj ankaŭ al aliaj grupoj.

Punkto 5 c

„Organizo de interŝanĝo de spertoj rilate al eksterlanda korespondado.“

Tia spert-interŝanĝo ĝis nun nur malofte okazis, kiel montras al ni la ekzemplo de kolektiva korespondado Rostock—Tallin.

Punkto 5 d

Tro multaj grupoj estas lingvosocietoj kaj babilas nur pri la disvastigo kaj la sukcesoj de esperanto.

Tio certe ankaŭ estas interesa kaj ĝusta, sed esperanto ja ne estas memcela!

Necesas diskuto kaj prelegoj pri bazaj demandoj de nia tempo ekzemple okazis

— en Dresden kaj Berlino distingitaj Vjetnamio-prelegoj

— en Berlin prelego pri cibernetiko, kortransplantado, lingvaj problemoj kaj aliaj.

Diskutante la direktivojn punkto post punkto la grupoj ellaboru siajn eblecojn de kunlaboro kun aliaj fakoj de Germana Kulturligo kaj aliaj GDR-organizaĵoj kun la celo utiligi esperanton por la fortigo de nia respubliko kun la konvinko, ke per tio ni pruvos la taŭgecon de esperanto por la homa socio kaj speciale ankaŭ por nia patrio, GDR.

Ni alvokas ĉiujn serioze laboremajn esperantistojn komuniki al ni iliajn spertojn kaj sugestojn en la realigo de niaj „Direktivoj“.

WIR UND UNSERE ARBEITERPARTEI

Zu unseren Beiträgen über die Arbeiter-Esperanto-Bewegung und ihre Rolle im internationalen Klassenkampf erreichten uns Briefe verdienstvoller Arbeiter-Esperantisten. Wir geben im folgenden den Brief von Ernst Diedrich, Warin, geringfügig gekürzt wieder:

1930, als 21jähriger, wurde ich Mitglied der KPD. In diesem Jahr lernte ich auch in wenigen Wochen Esperanto und wurde Mitglied des Arbeiter-Esperanto-Bundes (AEB) in Mecklenburg. Wir Arbeiter-Esperantisten fühlten uns der KPD zugehörig. Die leitenden Genossen der Rostocker Landesleitung der KPD *Bernhard Quandt* [1]), *Hans Warnke* [2]) und andere waren eben unsere (auch die der parteilosen Esperantisten) Arbeiterführer. Gerade damals wurde durch die Initiative von *Rudi Graetz* in Rostock für ganz Mecklenburg die revolutionäre Linie in den AEB hineingetragen. Rudi Graetz's öffentliches Bekenntnis für den Marxismus-Leninismus in der „Volkswacht" machte viel Aufsehen in Rostock und Mecklenburg. Ihm persönlich trug es aber ein, daß er seine Lebensstellung verlor („Junger Mann in fester Position", wie es damals bei Kleinbürgern hieß) und auf Jahre hinaus an die Erwerbslosenarmee gebunden war.

Als unsere Mecklenburger Esperantogruppe von Rostock nach Dänemark und Schweden zu den dortigen Esperantisten fuhr, traten wir alle geschlossen als klassenbewußte Kommunisten auf. Internationale Sprache und die internationale Arbeiterbewegung, das gehört doch zusammen! Oder hätten die Esperantisten vielleicht zu den Deutschnationalen, gar zu den Nazis oder zu den Kriegskreditbejahern, zu den Durchhaltepolitikern (Brüning oder Papen waren ja die „kleineren Übel" gegenüber Hitler) und den Verleumdern des ersten sozialistischen Staates, zu den Opportunisten in der SPD gehen sollen?

Gerade mit dieser letzten Partei hatte doch der aus der SPD kommende Rudi Graetz gebrochen, weil er klar sah, daß er gar nicht mehr in einer Arbeiterpartei war, die mit dem Denken und Fühlen revolutionärer Esperantisten übereinstimmte.

Keine Esperanto-Organisation ist je so schnell und energisch gewachsen wie jene IPE [3]) unter der Führung der Kommunisten. Keine Esperanto-Zeitung war so begeisternd und klar wie unser „Internaciisto" [4]). Unsere Treuherzigkeit und Begeisterung für die Sowjetunion und den Sozialismus, für die Komintern, verbunden mit dem vielen Briefwechsel in Esperanto, zog immer wieder ehrliche Menschen aller Schichten zu uns heran. Hier in Warin machten wir selbst die jungen SA-Leute unsicher. Unsere damalige oft nicht gerade diplomatische Begeisterung für „Sowjetrußland" tat glücklicherweise keinen Schaden. Die deutschen Monopolherren mußten sich dringend beeilen; in einigen Jahren hätten wir sie unter der Führung Ernst Thälmanns, Wilhelm Piecks und anderer Genossen überrannt. Schaden kann nur der blinde Antisowjetismus gewisser Cliquen.

Für den Neutralismus hatten wir nichts übrig. „For la neŭtralismo el la Esperanto-movado!" hieß es.

Als der IPE-Kongreß [5]) stattfand, flog ich wegen meiner Teilnahme endgültig auf die Straße, und der Blankenberger Bahnmeister schickte mich zum Stempelamt. Wie arm war ich damals. Trotz „Karo einfach aus der Hand“ (= trockenes Brot) reichte mein Geld so oder so nicht ... und trotzdem war die Teilnahme an diesem Kongreß, die nächtelangen Esperanto-Gespräche auf dem Strohlager in der Dirksenstraße mit ungarischen, polnischen, rumänischen, italienischen, jugoslawischen Proletariern ein Höhepunkt in meinem Leben. Welch eine lebendige Schulung im Kommunismus und Internationalismus für einen unerfahrenen Dorfjungen aus Mecklenburg wie ich es war! Heute stehen wir genau genommen wieder unter der Obhut und Leitung derselben Arbeiterpartei wie damals. Wieso muß ich nicht erklären. In Erinnerung dessen, was uns damals die Zugehörigkeit zur Partei Lenins für die internationale Sprache gebracht hat, sollten alle Esperantisten von jener Tradition lernen – und genau so offenherzig und klar mitarbeiten, um als wirklich klassenbewußte und zuverlässige Körperschaften angesehen zu werden. Seht euch nur einmal die Menge der Korrespondenzwünsche sowjetischer Esperantisten an! Könnten wir nicht einen Großteil der Arbeit leisten, die die Freundschaft unserer Menschen zur SU vertieft?

Überzeugend wirkt nur unsere sinnvolle sprachliche Praxis: die Freundschaft mit unseren Brüdern in den sozialistischen Ländern, die nachhaltige Verbreitung unseres sozialistischen Ideenreichtums im kapitalistischen Ausland und natürlich auch die Vervollkommnung unserer sprachlichen Fähigkeiten! Als Internationalisten müssen wir, gerade wir, in erster Linie für jede Solidarität mit den gegen den Imperialismus kämpfenden Völkern sein. Stärken wir allseitig unsere DDR gegen die verkommene, dekadente Gedankenwelt und den moralischen Schmutz der westdeutschen Imperialisten und Neonazis. Das sind dieselben Unmenschen, die uns in Not, Hunger, Hoffnungslosigkeit darben ließen, und die uns nach 1933 in Zuchthäusern und KZ quälten, die Millionen und Millionen Proletariern und einfachen Menschen für ihre Profite das Leben stahlen. Man kann sie nur hassen, weil sie nichts, gar nichts aus der fluchwürdigen Vergangenheit gelernt haben. Wer diese Tatsachen vergißt, kann der wirklich Esperantist im wahren Sinne des Wortes sein?

Mein Vorschlag: Wer seine Arbeitsweise in den Esperantogruppen noch nicht geändert hat, der ändere sie jetzt! Unsere Zeitschrift berichte regelmäßig über gute Beispiele und Erfahrungen! Die Stärkung unserer Republik, auch durch uns, sei allen Verpflichtung zum 20. Jahrestag.

(Anmerkung der Redaktion: [1]) Bernhard Quandt - 1. Sekretär der Bezirksleitung der SED in Schwerin; [2]) Hans Warnke - Mitglied des ZK der SED; [3]) [4]) IPE - Internationale der Proletarischen Esperantisten, „Internaciisto“ - der „Internationalist“, vgl. „d. e.“ Nr. 25, S. 7; [5]) Berlin 1932. Auf dem 1. IPE-Kongreß sagten sich die klassenbewußten Arbeiter-Esperantisten von der antisowjetischen und anarchistischen SAT los und bildeten eine eigene revolutionäre Esperanto-Organisation mit marxistischem Statut.)

Ernst Diedrich

Bazaj problemoj de la vort-teorio de Esperanto

1. Kelkaj lingvaj superecoj de Esperanto

La internacian lingvon Esperanto karakterizas kompare al la naciaj lingvoj kelkaj gravaj ecoj, kiuj parte konsistigas ĝian lingvan taŭgecon, superante kelkrilate tiun de la naciaj lingvoj.

Temas ĉefe pri jenaj: *la preskaŭa ortofonetikeco* (unu litero = unu sono) *la normita gramatiko, la internacieco de la vortaro* kaj *ĝia vortkrea sistemo.*

Nin nun speciale interesu la vortkrea sistemo de Esperanto, kiel ĝi finfine post pli ol 60-jara diskuto estas akceptita kiel oficiala de la Akademio de Esperanto en la jaro 1967 [1]).

2. La enhavo de la vorto

La signifo de iu nocio, do ties enhavo, devas esti konata dum la komunikada proceso al la parolanto kaj al la alparolato. Ĝi estas donita en la vortaro aŭ per nura traduko (*ŝajni = erscheinen),* kiu ofte plusencas aŭ per difina komento kiel ekzemple en la „Plena Vortaro" (*ŝajni = ekstere aspekti simile al io alia, tiamaniere, ke povas okazi aŭ efektive okazas konfuzo kaj eraro: ŝajnas al mi, ke mi la patron vidas.)* [2]) La suno do ne povas „*ŝajni*" *(nur brili).*

La semantika enhavo de la radikvortoj estas donita per decido Zamenhofa (traduko en la Universala Vortaro) aŭ akademia aŭ de la valida praktiko. (*ŝafo, kemio, koncepto).* Konante la enhavon de la radikaj *(skrib')* de la gramatikaj finaĵoj *o, a, e, i* kaj de la afiksoj *(mis, aĵ)* oni povas formi logike kaj analogie novajn vortojn, la *vortkunmetojn.*

Ili esprimas pere de la kunmetitaj vortelementoj ankaŭ kunmetitan ideon *(skrib-ist-in-o).* Grandan helpon ĉe la encerbigo de la kunmetitaj vortoj kaj ties signifo donas al la esperantisto baza scio pri la *vort-teorio de Esperanto,* kiu estas pritraktita en la ĝeneralaj lernolibroj bedaŭrinde aŭ tute ne aŭ nur allude.

Sed ĝuste la baza scio pri la vortteorio evitigus multajn erarojn kaj videbligas la klaran strukturon de la esperanta vorttrezoro.

3. Malregulaĵoj?

Komencanto nekonante kelkajn principojn de la vortfarado, eble lernas, ke formigo de personoj eblas per *adjektivo + sufikso -ul + finaĵo o.* Do *fremda — fremdulo; granda — grandulo, reĝa — reĝulo* [3]), *despota — despotulo.* Sed *reĝulo* kaj *despotulo* ne ekzistas (ĝuste: *reĝo, despoto),* kiel li facile povas kontroli en ĉiu vortaro. Ankaŭ konatas, ke vortoj n por instrumentoj eblas formi per *verbo + sufikso il + finaĵo o.* Do *segi — segilo, tranĉi — tranĉilo, brosi — brosilo*[3]), *bremsi — bremsilo*[3]). Sed *brosilo* kaj *bremsilo* ne ekzistas (ĝuste: *broso, bremso).*

Same ni scias ke la *sufikso -ist + o indikas personon havanta profesion aŭ daure okupiĝanta pri io.* Ni konas *labori — laboristo, baki — bakisto;* sed *tajlori — tajloristo, aktori — aktoristo* estas malĝustaj kunmetoj *(tajloro, aktoro).* Aŭ ni scias, ke *-in + finaĵo o indikas feminan estaĵon: patrino, katino.* Sed ĉu *matrono* kaj *nimfo* ne ankaŭ estas enhave feminaj? Ĉu *kamarado* aŭ *amiko* ne estas uloj aŭ *kulero* kaj *spato* ne uloj?

En la sistemo de la vortfarado troviĝas malregulaĵoj, oni povus supraĵe konkludi. Tamen ne.

4. Vortatomoj kun gramatika karaktero

Multaj esperantistoj aŭtomate kunmetas la vortojn laŭ lernitaj modeloj, do analogie. Miskunmetoj kiel la ĵus montritaj nur okazas, se oni ignoras jenajn principojn:

a) La konsisto de la vortoj el *vortatomoj,,*

b) la *gramatika karaktero* de la radikoj kaj afiksoj.

Pri kio temas?

Ĉiu vorto esperanta konsistas el unuopaj elementoj *(vortatomoj),* kiuj havas principe memstaran sencon. Zamenhof skribas:

„Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj . . . Tiel ekzemple la devenon de la vorto „fratino", kiu en efektivo konsistas el la tri vortoj: frat (frato), in (virino), o (kio estas, ekzistas) = kio estas frato-virino-fratino . . ." [4]) La signifo de multaj radikoj estas fiksita unuafoje de Zamenhof mem. En la Unua Libro 1887 troviĝis 920 elementoj kaj en la Universala Vortaro 1893 2650 elementoj. En la Universala Vortaro oni ekzemple trovas por *bros' brosse/brush/Bürste/*щемка */szczotka* [5]), por *tajlor' tailleur/tailor/Schneider/* портной *krawiec* [6]) (laŭ la vico la traduko en la lingvoj franca, angla, germana, rusa kaj pola).

Do *broso* estas jam per tiu difino en si mem instrumento (ilo). Algluo de la sufikso *—il'* estus pleonasmo (denova esprimo por jam esprimita ideo).

La samo validas por *tajloro.* La difino de tajloro jam inkluzivas la enhavon *—ist'.* La difinoj de *kamarado* kaj *reĝo* same inkluzivas la enhavon de *—ul',* kaj *matrono* tiun de *—in'* ktp.

Do nur konante la *gramatikan karakteron* de la vortoj oni povas senare vortformi. Ĝenerale estas indikitaj en la Esperanto / nacilingvaj vortaroj tiu karaktero. Ofte la unua vorto de vortfamilio estas la „gvidvorto", de kiu oni povas formi la aliajn. Sed ankaŭ ekzistas esceptoj kiel ekzemple ĉe E. D. Krause Esperanto—Deutsches Wörterbuch, Leipzig 1967. Tie mankas indiko pri la gramatika karaktero de la vortoj, kaj ne konante la vortteorion oni ofte ne trovas logikon ekzemple en simila aranĝo: *bremsado, bremsdistanco, bremsvojo, bremsi, bremso . . .* [7]) Post *bremsi* oni kompreneble kutimus formi la kunmeton *bremsilo.* Tamen la manko ne tiel sentebliĝas, ĉar Krause donas multajn ekzemplojn.

Cetere oni pro praktika uzo eĉ sente perceptas ke, *„la bel bird devas rest en la kaĝ"* nur povas signifi" la bela birdo devas resti en la kaĝo".

5. La gramatikaj finaĵoj kaj la afiksoj

Ni parolis pri „plena dismembrigo“ kaj „vortatomoj“. Kompreneble la gramatikaj finaĵoj o, a, i, e kaj la afiksoj same havas gramatikan karakteron.

„La gramatikaj finaĵoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj“[8]) tekstas la 11—a regulo de la Fundamenta Gramatiko. La enhavoj de la gramatikaj finaĵoj estas jenaj:

o = kio estas, ekzistas (domo, farado)
a = kiu havas econ, aŭ kiu rilatas al (agrabla, doma)
i = fari agon aŭ esti en stato (skribi; saṇi = esti sana)
e = laŭ maniero (rapide)

Ekzemplo:

skribi (radiko skrib') = écrire / write / schreiben / писать / picaĉ.[10])

skribo = aĵo aŭ ago, kiu estas, kiu ekzistas, karakterizita per la ago skrib'.

Aŭ *tajlori = fari agon kiel tajloro.*

Oni do povas klasifi la vortradikojn laŭ ilia gramatika karaktero ekzemple:

Substantivradikoj: abel', abrikot', afer' k.t.p.

Adjektivradikoj: afabl', agrabl', bel' k.t.p.

Verbradikoj: aĉet', ag', skrib' k.t.p.

La *prepozicioj, konjunkcioj* kaj kelkaj aliaj vortgrupoj estas *senkarakteraj:* de, post, kaj, adiaŭ, ajn . . .

La sufiksoj laŭ enhavo ankaŭ diferencas: *substantivaj:* aĵ, ul, ist, an, il, ej, uj, ar, in, ing, er, estr, id.

Ili estas uzeblaj kiel memstaraj substantivoj (ekz. *aĵo, ilo, estro, ido).*

Adjektivaj: ec, ebl, ind, em.

Ili estas uzeblaj kiel memstaraj adjektivoj (ekz. *ebla, inda, ema)* aŭ adverboj (ekz. *eble, inde).*

Verbaj ad, ig, iĝ. Ili estas uzeblaj kiel memstaraj verboj (ekz. *igi, iĝi*).
Sen gramatika enhavo estas eg, et, aĉ, um.

6. Rigida kaj elasta sencoj

Ĉiu germana vorto povas depende de la kunteksto alpreni diversajn senconuancojn aŭ tute diversajn sencojn. Ekzemple: *Herr Müller g e h t. Es g e h t mir gut. Die Ware g e h t schlecht.*

Ankaŭ por Esperanto tio validas. Temas pri la efiko de la kunteksto je la senco de la vorto. Diference al la naciaj lingvoj la kunteksto esperanta ankaŭ efikas regulige rilate la uzon de la afiksoj. Ni ekzamenu jenajn ekzemplerojn:

a) La verspermanĝo estis bona.

b) La problemo de manĝaĵo estas solvita.

c) El „Hamlet“: *Kiel vi sigelis tiun skribon?*

d) Oni atendis la skribaĵon.

Laŭ strikte logika principo, kiel antaŭe montrite, en la ekzemploj a) kaj c) ja devus esti postulata anstataŭ *verspermanĝo vespermanĝaĵo* kaj anstataŭ skribo *skribaĵo*, ĉar vere laŭ strikta logiko la enhavo de manĝo estas = *kio estas, ekzistas el speco manĝ'*. Sed. ĉar *manĝ'* = *manĝi* laŭ Universala Vortaro estas verba (do aga) radiko *manĝo* nur povus esti „*ago el speco manĝ*". Do *vespermanĝo* devus esti „*manĝago dum vespero*". Same *skribo* devus esti *skribago*, ĉar la radiko *skrib'* enhavas agon (schreiben). Tamen la ekzemploj a) kaj c) (de Zamenhof) estas korektaj. Kial? Ofte la kunteksto ne allasas iun dubon pri la ĝusta enhavo de la vorto. Tiam laŭ la ĝenerala principo de la *vortekonomio*, kiu regas an ĉiu lingvo, oni povas malhavi kelkajn vortojn, eĉ tutajn frazojn: „Bonan tagon!" Tio origine signifas: „Mi deziras al vi bonan tagon". Do oni ŝparis vortojn. Same oni povas ŝpari afiksojn. se la dezirita senco de la vorto estas plene elvokita per la radiko kaj la kunteksto. Ĉe la ekzemploj a) kaj c) ne povas estĭ iu dubo, ke temas pri aĵo, kiun oni manĝas vespere, aŭ skribo, kiun oni sigelos. La ekzemploj b) kaj d) postulas la plenan aldonon de la sufikso aĵo. Se mankus -aĵ en b) kaj a) oni ne scius, ĉu temas pri ago aŭ aĵo (problemo de manĝado aŭ de manĝaĵo?)

La cifero „1969" ĝenerale klare montras. ke temas pri kalendara jaro. „„69" jam pli facile povus havi alian sencon. Sed ĉe „28. 4. 69" ne povas ekzisti ia dubo.

René de Saussure, fama esperantologo, klarigis la „duoblan logikon" en la vortfarado de Esperanto, kiel ĝi en la praktiko efikas, per principoj: La PRINCIPO DE RIGIDECO (unusenceco de la vorto): „*Ĉiu vorto posedas unu sencon rigidan, nome tiun, kiu plej nature rezultas de ĝia tuta enhavo kaj nur de tiu enhavo, t. e. de la enhavo de ĝiaj diversaj partoj*"[11]). *Manĝo* laŭ tiu regulo nur povas esti *ago*, same skribo ktp.

Sed, manĝo kaj skribo, ankaŭ povas esti *rezultoj* de la agoj, do *aĵo* laŭ la PRINCIPO DE ELASTECO:

„*Krom tiu rigida senco povas ĉiu vorto akiri diversajn pli malpli elastajn sencojn, kiuj rezultas ne nur de la enhavo de l'vorto sed de la akompananta kunteksto*"[12]). El ĉi ĉio jam videblas, ke nur relative ĝusta estas la ĝenerala aserto, ke en Esperanto unu vorto havas nur unu sencon. Tiuj du principoj ne volas kaŝi iun nelogikecon de la Esperanta vortfara sistemo. Ja ne temas pri nelogikeco sed pri la fakto. ke Esperanto estas ekstreme elasta lingvo. Per la praktika uzo kaj la lingva konvencio ofte aŭ la rigida aŭ la elasta senco de la vortoj regas. Ekzemple *fendo* estas laŭ Plena Vortaro „*mallarĝa laŭlonga truo*"[13]). Laŭ la Principo de Rigideco fendo devus esti *ago el speco fend'*, sed ne „laŭlonga truo", kiu ja estas rezulto de la ago fend'. Tial por plene elvoki la ideon de ago, oni uzas la sufikson ad, do *fendado*.

7. Sufiĉo kaj neceso

Ĝis nun ni analizis. Sed la vortkrea proceso estas sintezo. Dum la parolo ni volas realigi ĉefe du celojn kaj ilin akordigi: Klareco kaj senca precizeco devas harmonii kun eleganteco kaj elasteco. Por kunigi tiujn du postulojn ni nin bazas sur la principoj de rigideco kaj elasteco.

Se oni pedante volus kunmeti la vortojn enkondukante la eblajn afiksojn, oni ne dirus *skribaĵo*, aŭ eĉ nur *skribo* sed eble *skribitaĵo*, anstataŭ *konstruo* aŭ *konstruaĵo* eble *konstruitaĵo (konstruataĵo)*. Ĉar *bakisto* bakas panojn ni devus eble diri *panojnbakisto*, ĉu ne? Sed oni uzas la kunmeton

panbakisto. Okulfrape estas la fakto ke ni parolas pri *azenlakto* anstataŭ *azeninlakto,* kvankam ni certe scias, ke nur la ina azeno donas lakton. Por la vortkrea proceso do efikas la grava ankaŭ de René de Saussure unuafoje formulita principo, kiu rilatas semantike al la Principo de Rigideco. Ĝi nomiĝas *PRINCIPO de SUFIĈO* kaj tekstas: *„Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata de la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa“*[14]). Do ne trouzu la afiksojn! Ni tuj konstatas, ke *blondulino ne* respondas al tiu principo. Sufiĉus *blondino,* ĉar en la afikso *-in'* jam en enestas la signifo de femina ul'. Tamen la uzo de *-ulino* enradikiĝis en la lingvouzo.

La nura observo de tiu ĉi principo povus konduki al troa ŝparo de la vortkreaj elementoj. Parolante pri *bela manĝo* sen kunteksto, oni eble ne scias ĉu temas pri la *ago* aŭ *iu aĵo.*

Do necesas por la ekvilibro en la lingvo dua principo, la PRINCIPO de NECESO: *„En konstruo de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn sufiksojn, prefiksojn kaj finaĵojn necesajn por elvoki plene la ideon esprimotan de tiu vorto“*[15]).

Do ni ne forgesu la necesajn afiksojn! Sen kunteksta indiko ni do diru *manĝaĵo,* se ni imagas aĵon. Same ne sufiĉas diri *„la bela venis“,* se la kunteksto aŭ la situacio ne indikas ĉu temas pri bela ino aŭ ulo.

8. Resumo

Okupiĝante pri la simplaj kunmetitaj esperantaj vortoj (radiko + sufikso) ni konstatis:

a) Ekzistas substantivaj, verbaj kaj adjektivaj vortradikoj kaj sufiksoj.
b) Sin bazante je tiu fakto oni kunmetas (ne derivas) la deziritajn ideojn.
c) La vortoj havas rigidan kaj elastan sencojn, kiuj estas elvokendaj laŭ la klariga kunteksto.
d) La faktoj el c) speguliĝas por la praktika vortkreado en la Principoj de Sufiĉo kaj Neceso.

La problemojn de la vortkunmetoj kun kelkaj radikoj kaj afiksoj *(bluokula, junedzino, belkanto, dikfingro ...)* pritraktos alia studo.

9. Fontindikoj

[1]) Aktoj de la Akademio 1963—1967 (oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto — No 9), Rotterdam, Paris 1967, pĝ. 55—70
[2]) Plena Vortaro de Esperanto, 6-a eld. 1960 SAT Paris, pĝ. 453
[3]) Kun „[3])“ signitaj vortoj estas malĝuste kunmetitaj
[4]) L. L. Zamenhof „Fundamenta Krestomatio“ Paris 1909, Libraire Hachette, pĝ. 248
[5]) [6]) L. L. Zamenhof: Universala Vortaro en „Fundamento de Esperanto“ 9-a eldono, red. de A. Abault, Marmande 1963, pĝ. 147 kaj 222.
[7]) E. D. Krause: Esperanto-Deutsch-Wörterbuch, Leipzig 1967, pĝ. 33
[8]) vd. [5]) [6]) pĝ. 66 en germana lingvo
[10]) vd. [5]) [6]) pĝ. 217
[11]) [12]) René de Saussure (Antido): La vort-teorio en Esperanto UEA, Genève 1914, pĝ. 9
[13]) vd. [2]) pĝ. 126
[14]) [15]) R. G. Isbrucker: Pri la vortfarado en Esperanto en „Esperantologio“, Internacia Revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto, Vol. II/Nro 1, Nov. 1959, Kopenhagen, pĝ. 33.

Detlev Blanke

ESPERANTO-POŜTSTAMPOJ

Hispanio

1934	Valencia	Laborista E-Kongreso
1936	Manresa	18a kataluna E-Kongreso
1954	Zaragoza	15a E-Kongreso
1956	Zaragoza	26a katolika E-Kongreso
1961	Barcelona	13a IFEF-Kongreso
1964	Valencia	25a nacia E-Kongreso
1965	Valencia	26a nacia E-Kongreso
1966	Bilbao	27a nacia E-Kongreso
1967	Zaragoza	28a nacia E-Kongreso
1968	Madrid	53a Universala Kongreso

Hungario

1918	Budapest	Pm kaj E-ekspozicio
1929	Budapest	21a Universala Kongreso
1941	Szentes	15a nacia E-Kongreso
1946	Oroshaza	16a nacia E-Kongreso
1947	Hodmezövasarhely	Konferenco
1948	Györ	18a nacia E-Kongreso
1948	Budapest	Danubvala E-Konferenco
1957	Budapest	2a Teritoria E-renkontiĝo
1957	Budapest	„Eseranto Lingvo Internacia“
1957	Budapest	„Unua Tago“
1957	Szeged	6a Sudhungara E-renkontiĝo
1957	Miskolc	Nordhungara E-renkontiĝo
1958	Oroshaza	7a Sudhungara E-renkontiĝo
1958	Eger	2a Nordhungara E-renkontiĝo
1959	Debrecen	Orienthungara E-renkontiĝo
1959	Budapest	3a Teritoria E-renkontiĝo
1960	Budapest	4a Teritoria E-renkontiĝo
1960	Miskolc	3a Nordhungara E-renkontiĝo
1962	Budapest	14a IFEF-Kongreso
1962	Budapest	E-Jubileoj
1966	Pecs	22a TEJO-Kongreso
1966	Budapest	51a Universala Kongreso
1967	Gyula	5a Somera E-Universitato
1968	Gyula	6a Somera E-Universitato

Bezirkstreffen der Esperantofreunde in Brandenburg/Havel

Am 17. und 18. Mai 1969 führten die Esperantisten des Bezirkes Potsdam im Fontaneklub in Brandenburg ihr Bezirkstreffen in Vorbereitung des 20. Jahrestages der DDR durch. Das vielseitige inhaltsreiche Programm wird allen lange in Erinnerung bleiben und vermittelte den 60 Esperantisten wertvolle Anregung für ihre weitere Arbeit zur Stärkung der DDR. Interessante Gäste nahmen am Treffen teil. So vermittelte den Teilnehmern die Brandenburger Stadträtin Frau *Dr. Rankewitz* einen eindrucksvollen Einblick in die Vergangenheit, Gegenwart und die Zukunft der bekannten Stadt der Arbeiterbewegung. Ihr anschaulicher Bericht fand ungeteilten Beifall. Der erste Oberbürgermeister Brandenburgs nach dem 2. Weltkrieg, der verdienstvolle Veteran der deutschen Arbeiterbewegung, *Max Herm*, wußte zu berichten, daß bereits vor dem Faschismus auch in Brandenburg Esperantozirkel für Arbeiter bestanden haben. Max Herm erzählte aus seinem erlebnisreichen Leben als Arbeiterfunktionär.

Mit Interesse vernahmen die Esperantofreunde vom Perspektivplan Brandenburgs und diskutierten über die Zukunft ihrer Stadt. Frau *Tornow*, Kreissekretärin des DKB in Brandenburg, führte die Teilnehmer durch das städtische Heimatmuseum. Sie verstand es sehr gut, den Besuchern besonders auch die Geschichte der Brandenburger Arbeiterbewegung anhand der vielen Ausstellungsstücke zu erläutern.

Eine gut organisierte Stadtrundfahrt machte die Esperantisten mit dem neuerbauten Stadtteil Nord und dem VEB Stahl- und Walzwerk bekannt. Sie erfuhren, wie sich aus dem Werk des ehemaligen Flick-Konzern ein sozialistischer Großbetrieb entwickelt, der zu den größten und modernsten der DDR gehören wird.

Aber auch die Geselligkeit wurde nicht vergessen. Die Neuruppiner Jugendgruppe unter der Leitung des Bundesfreundes Ludwig Schödl trug Lieder vor und sorgte für gute Stimmung. Alles in allem, das Treffen war ausgezeichnet gelungen und gab auch für alle Teilnehmer gute Möglichkeiten, Erfahrungen und Gedanken zur Verbesserung der Arbeit der Esperantisten zur Stärkung der DDR auszutauschen.

Besonderen Dank verdienen die Bundesfreunde Frau Tornow (Kreisleitung des DKB, Brandenburg), Heinz Rupp (1. Bezirkssekretär des DKB, Potsdam) und nicht zuletzt die Brandenburger Esperantofreunde für die gute Vorbereitung des Treffens.

(Nach Berichten von O. Brandt, F. Görlich und R. Rabenalt)

Anmerkung der Redaktion: Welcher Bezirksarbeitskreis wird von ähnlich gelungenen und inhaltsreichen Treffen berichten können?

Veranstaltungen der Solidarität mit Vietnam

Berlin

Wie alle Bürger der DDR so fühlen sich auch die Esperantisten in den Gruppen des Deutschen Kulturbundes eng verbunden mit dem um seine Freiheit ringenden vietnamesischen Volk. Die Berliner Esperantisten hatten daher einige Veranstaltungen durchgeführt, die der Solidarität mit Vietnam gewidmet waren und zu den interessantesten und eindrucksvollsten Erlebnissen der Gruppenmitglieder gehören werden.

Bereits am 17. März 1969 hatte der Bundesfreund *Gennert* einen Vortrag „Vietnams Befreiungskampf" gehalten, der guten Anklang fand und den Vorschlag zur Folge hatte, eine Serie von Vorträgen und Veranstaltungen zum Thema „Vietnam" zu organisieren. Ein Vortrag über die vietnamesische Sprache folgte von Bundesfreund *v. Waldowski*, der auch über die „Geographie Vietnams" sprach.

Zu einem besonderen Erlebnis wurde die Begegnung mit dem Mitglied des Vietnamausschusses der DDR, Herrn *Fengler*, der erst vor kurzer Zeit die DRV besucht hatte. Er verstand es ausgezeichnet, anhand vieler Einzelerlebnisse und Begegnungen, vor allem auch mit vietnamesischen Kindern, ein lebendiges Bild von der tiefen Menschlichkeit und dem großen Heroismus dieses tapferen Volkes entstehen zu lassen. Viele noch nicht veröffentlichte Fotos über seine Reise, vietnamesische Gegenstände und die Tonbandaufnahmen von Liedern vietnamesischer Kinder veranschaulichten seine außerordentlich interessanten Ausführungen.

Einen Höhepunkt, nicht aber ihren Abschluß, fand die Aktion der Berliner Esperantisten im Deutschen Kulturbund in dem Treffen mit dem *Presse- und Kulturattachè* der Botschaft der DRV in der DDR, der in einer kurzen Ansprache die gegenwärtige Lage in Vietnam charakterisierte und auf das 10-Punkte-Programm der FNL einging. Es gab sofort eine rege Diskussion, wie sie überhaupt für alle Veranstaltungen charakteristisch war.

In der Pause konnte eine kleine Ausstellung vietnamesischer Literatur besichtigt werden. Bisher hat die DRV und ein Verlag der FNL 32 Broschüren (Romane, Novellensammlungen, Gedichtbände, Dokumente) in Esperanto herausgegeben.

Der Abend wurde beendet mit der Annahme einer Grußadresse an die Delegierten der MEM zum Weltfriedenstreffen in Berlin 1969. Die Spendenaktion der Berliner Esperantisten wird bis zum 20. Jahrestag fortgeführt. Andere Bezirksarbeitskreise und Kreisarbeitsgruppen Esperanto im Deutschen Kulturbund sind aufgerufen, ihrem Beispiel zu folgen.

Hervorzuheben ist die gute Initiative und Einsatzbereitschaft der Berliner Esperantisten, die den vollen Erfolg dieser Vietnamaktion garantierte. Sie haben in Auswertung der fortschrittlichen Traditionen der Arbeiter-Esperanto-Bewegung mit ihrer Initiative einen Weg gefunden, gesellschaftlich wirksamer zu werden und sich mit den aktuellen Problemen der Gegenwart aktiv zu beschäftigen. Das dient dem gesellschaftlichen Fortschritt und schafft der Arbeit der Esperantisten Anerkennung.

Wollenberg

Karl-Marx-Stadt

Die Esperantisten im Bezirk Karl-Marx-Stadt haben in Vorbereitung des 20. Jahrestages ihren ausländischen Freunden die Frage vorgelegt „Was wissen Sie über die DDR". Die ausgewerteten Materialien werden Impulse für die Kollektivkorrespondenz geben.

Ein Dia-Tonvortrag über die Entwicklung des Bezirkes ist in Vorbereitung und wird dann ausländischen Freunden zur Verfügung gestellt.

Erfahrene Esperantofreunde, die vor dem Faschismus aktiv in der Arbeiter-Esperanto-Bewegung des Bezirkes Erzgebirge/Vogtland mitgearbeitet haben, bereiten eine Dokumentation über die fortschrittlichen Traditionen des AEB in diesem Gebiet vor.

Die Übersetzungskommission des Bezirksarbeitskreises sieht ihre Aufgabe auch darin, sich mit spezifischen Texten zu befassen. So gibt es Bundesfreunde, die sich zur Zeit mit den Fachausdrücken der Textilindustrie und der Geologie beschäftigen.

Berlin

La 3—an de junio vizitis la Esperanto-grupon Prenzlauer Berg la prezidanto de Norvega Esperanto Asocio, Profesoro *Støp-Bowitz*, membro de la Akademio de Esperanto. Profesoro Støp-Bowitz vigle raportis pri Norvegio, la laboro de la Akademio kaj pri vortaraj demandoj.

Preseraro

Ni petas pardonon pro la grava preseraro sur la unua paĝo. Kompreneble devas teksti: Resolution

Renkontiĝo en Löbau

La subdistrikta Esperanto-laborrondo Zittau aranĝis la 18-an de majo en Löbau la 3-an renkontiĝin por la regiono de Supra Luzacio. Partoprenis 36 esperantistoj, inter ili 4 amikoj el Jablonice, ČSSR. Post la oficiala malfermo kaj ambaŭflankaj salutparoladoj la partoprenantoj kune kantis „Fratoj al sun' libereco". S-ro *Sommer*, distriktsekretario de la Germana Kulturligo salutis la ĉeestantojn.

Ĉeftemoj de la aranĝo estis la necesa plibonigo de la politika ideologia kaj faka laboro en la grupoj. Menciindaj estis la raportoj de k-do *Krause* kaj Oskar *Walter* pri la laborista Esperanto-movado en supra luzacio.

Post longjara grava malsano mortis la 25-an de julio 1969 en aĝo de 60 jaroj la membro de Centra Laborrondo Esperanto

kamarado
ERWIN SCHLEUSENER

batalinto kontraŭ la faŝismo

Kiel aktiva laborista esperantisto li gvidis dum la faŝisma malhelo rezistadgrupon, kiu estis evoluinta el la Berlina grupo de Laborista Esperanto Asocio. Ni perdas en li klaskonscian kaj ageman esperantiston. Ni digne plenumos lian spiritan heredon. CLR

DISTRO



Horizontale: 1. Generalo de kozakoj; 5. Mono donanta profiton; 9. Aŭdigi konfuzajn sonojn sen harmonia eco (R); 10. Moderigi, kvietigi, obeiigi; 11. Pasigi fluidaĵon tra penetrebla tavolo (R); 12. Persono al kiu oni intime interrilatas (ina); 15. Implikaj krispaj fadenoj restantaj el ŝpinita kanabo aŭ lino kaj uzataj por ŝtopi (R); 18. Brando eltirita el rizo (R); 20. Surpodia seĝo por predikantoj aŭ profesoroj; 23. Diversforma ujeto el ligno, kartono ktp.; 25. Malgranda vegetaĵo kun blankaj floroj kaj flava rondeto ĉemeze; 26. Manportebla kofreto (R); 27. Grasa fluidaĵo (akuz.); Unuo de pezo; 32. Libreto, en kiu oni sciigas la horojn, kiam okazas diversaj faktoj; 34. Manĝebla riverfiŝo (plur.); 37. Persona nedifinita pronomo (akuz.); 38. Tute senvalora; 39. Genro de papagoj; 43. Persono al kiu oni intime interrilatas; 44. Ido de saltanta besteto (R); 45. Ne pli ol; 46. Publike paroladi; 47. Nomata unuo (plur.).

Vertikale: 1. Genro de malvacoj (granda, bela floro) (R); 2. Periode pagenda aŭ liverenda (R); 3. Malsama; 4. Konformiĝi je tio, kion aliulo ordonas resp. malpermesas; 5. Iri pli rapide ol marŝi; 6. Rezultato de retiro de ĉano ĉe pafilo; 7. Malprofunda vazo, el kiu oni manĝas; 8. Poezio, kantanta la personajn impresojn, sentojn kaj pasiojn de la poeto mem; 13. Speciala signo, resp. monunuo (R); 14. Genro de ekinodermoj, mara animalo manĝebla, simila al kaŝtano (de malsupre supren) (R); 16. Preparitaj por fumado folioj de vegetaĵo (akuz.); 17. Granda marbirdo (palmopiedulo) (R); 18. Ringoformaj insuloj formitaj de koraloj (akuz.); 19. Likvaĵo ricevita el la distilado de la vino, greno kpt. (R); 21. Aspiri posedon aŭ ĝuon de io (R); 22. Verda loko en la dezerto; 23. Resti senmove kaj vertikale sur la piedo (R); 24. Plej malgranda ero de materio; 29. Ne transiranta la limojn de iu parto de spaco; 30. Estanta en stato de aersimila fluidaĵo; 31. Iu alia; 32. La homa gento; 33. Nefleksebla; 35. Granda publika konkurso (R); 36. Angla mezurunuo (plur.); 39. Muskola organo; 40. Havi pli malpli kompletan kaj klaran ideon pri io aŭ iu; 41. Rondforme prilabori (R); 42. Ĝenerala vivmaniero kaj konduto kutima (de malsupre supren).

(R) = prenu nur la radikon!

Rothe

Paco estu en la mondo!

Flugu fine, pacmesaĝo,
ĝoja tra la tuta mondo,
voku vian pacsendaĵon
forte trans la tera rondo.

Diru, ke la mondhomaro:
Pace vivu, ne bateme.
Kantu ĉiam, jar' post jaro
vian packanton gajeme.

Paco estu en la mondo,
paco en la homa kor',
paco en la tera rondo,
luma kiel pura or'.

Karl Moser

POLA RADIO KOMUNIKAS

Krom la ĉiutaga 3foja elsendo de la duonhora programo (vd. „der Esperantist" n-ro 28/29, pĝ. 21) Radio Varsovio ankaŭ elsendas ĉiutage informojn en Esperanto en la germanlingva programo (8.30 horo, 250 m, 25 m, 31 m, 41 m, 49 m) en la svedlingva programo marde (21.30 horo), merkrede (8.00 horo), vendrede (21.30 horo) kaj sabate (8.00 horo) laŭ samaj ondolongoj kiel ĉe la germana programo. En la anglalingva programo oni aŭdas merkrede (12.00 horo, 31 m, 41 m) informojn en Esperanto. La itallingva programo havas Esperantoangulon merkrede (12.30 horo kaj 22.00 horo, 31 m kaj 41 m), same dimanĉe je 11.30 horo laŭ samaj ondolongoj.

En la danlingva programo enestas esperanto-disaŭdigoj merkrede 16.30 kaj 20.30 horo, 41 m, 49 m) kaj dimanĉe (13.00 horo, 200 m, 25 m, 31 m, 41 m, 49 m).

Oni nepre sendu leterojn kun kritikoj, sugestoj kaj indikoj pri la aŭdebleco al Pola Radio, Esperanto-Programo, Varsovio, Pollando. De la eĥo flanke la aŭskultantoj dependas la daŭrigo aŭ eĉ pliampleksigo de la elsendoj

KORESPONDDEZIROJ

Bulgario

Por niaj gelernatoj, gejunuloj kaj pli aĝaj geesperantistoj ni serĉas korespondamikojn el la tuta mondo. Pedagogia Esperantista Societo „L. L. Zamenhof“, **Vraca.**

ČSSR

Knabino, 15 jara, deziras korespondi kun geknaboj el GDR. Vera Bartošova, Lesnov 5, p. **Všelibice,** o. Liberec.
Knabo, 15 jara, deziras korespondi kun geknaboj el GDR. Josef Růžižicka, Roten 9, p. **Všelibice,** o. Liberec.

Japanio

Japanulino, 21 jara, deziras korespondi kun geamikoj el GDR. Micuka Takahasi 6-18-5 Kamijoga, Setagaya-ku, **Tokio.**

Pollando

Lernantino, 14 jara, deziras korespondi pri fotoj de geaktoroj, kol. bildkartojn, poŝtmarkojn, gramofondiskojn. Grazyna Zadworna, **Babimost,** ul. 28, styczznia 5/2 pow. Sulechow, woj. Zielona Gora.

Teknikisto, 22 jara, interesiĝas pri muziko, geografio, sporto, kolektas fotoalbumojn, diskojn. Tadeus Rajnysz, **Chorzow** 2, ul. Kryzowcz 8/5 woj. Katowice.

Teknikisto, 20 jara, interesiĝas pri muziko, literaturo, ĉiutaga vivo, turismo, sporto, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, diskojn. Marek Trzcinksi, **Warszawa,** Nowelipie 12 Am 22.

Junulo, 19 jara, interesiĝas pri Esperanto-movado, literaturo, lingvoj kaj numismatiko, deziras korespondi pri menciitaj temoj, kolektas bildkartojn, E-librojn, monerojn, E-kantojn, ABC-librojn de diversaj lingvoj. Mieczyslaw Szostak, **Gwoznice-Gorna,** pow. Strzyzow n. Wa.

Oficistino, 35 jara, interesiĝas pri la ĉiutaga vivo, kolektas bildkartojn laŭ diversaj temoj. Eugenia Kibicka, **Siedlce,** Pulaskiego 55/18.

Geesperantistoj-muzikemuloj profesiaj aŭ amatoroj aliĝu al muziksekcio „La Verda Liro“. Mieĉislav Zgorzewski, **Wroclaw 2,** strytka pocztowa 22.

Esperantlingvajn tekstojn de modernaj kanzonoj deziras interŝanĝi Distra-Kultura Komisiono ĉe la Okcidenta Regiono de PEA, **Wroclaw-17,** str. Dubois 3. Ankaŭ kontaktoj serĉitaj kun kanzonistoj kaj ensembloj esperantistaj. Korespondi deziras Eduard Folcik, **Wroclaw,** Biskupia 3/8, 26 jara, instruisto.
Stanislava Stachowitz, **Wroclaw,** u. Lwowska 13/7, 35 jara.
Knabo, 12 jara, deziras korespondi kun geknaboj el GDR. Janusz Kurys, **Bystrzyca Ktodzka,** Lenskiego 14.

Rumanio

Constantin Paliciue, Str. M. Eminencu 10. Nasaud-Jud. **Bistrita Nasaud,** dez. korespondi tutmonde.

Bildkartojn ni ekspozas. Sendu specojn el via urbo. Ni rekompensas per bk el nia. **Remetea,** Esperanto-Klubo Nova Vojo. Depart. Harylrila.

Svedio

Nova esperantistino, 21-jara, deziras korespondi kun geesperantistoj, kiuj skribas klaran kaj simplan Esperanton. S-ino Marianne Andersson, **41736 Göteborg,** Vintervädersgatan 3, i.V.

Soveta Unio

Esp. poeto Danielo Kolker — kun ĉiuj landoj kontraŭ 100 uzitajn pm sendas aŭtografon de sia versaĵo! Adreso: Ĉumaĉenko 15-41 **Zaporozhie-58,** Ukraino. Validas ĉiam.

Junulo, 18-j. deziras korespondi kaj intersanĝi diskojn. Logvinento Jurij, **Doneck-62,** poŝtrestante, USSR.

Por la E-ekspozicio, aranĝota septembre en Moskva Universitato, estas bezonataj diverslandaj E-lernolibroj kaj vortaroj, revuoj kaj aliaj intersaj kaj belaspektaj esperantaĵoj. Post la fermo de la ekspozicio la eksponaĵoj estos laŭpostule resendotaj. Adreso: **Moskvo V-311,** ab. jaŝĉik 739, „Esperanto“.

Herausgeber: Deutscher Kulturbund (Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf: 225991.
Verantwortl. Redakteur: Eugen Menger. Redaktionskommsission: Otto Bäßler, Detlev Blanke, Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Erwin Schleusener, Willi Vildebrand. - Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DRR. Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf. - Druck: Druckwerkstätte Glauchau Julius Pickenhahn KG III-12-8 690

Somero 1969

La pentraĵo de prof. Walter Womacka „Sur la plaĝo“ estu saluto al tiuj, kiuj post laborriĉaj semajnoj ferias por trovi horojn de trankvilo kaj ripozo. Nian pentraĵon oni povas interpreti por tiuj tagoj diversmaniere. Ĝi estas spegulo de l'realo ĉie, kie la somero komencis. Signo de l'interna paco, de sekureco kaj neĝenita ĝojo ĝi nur povas esti tie, kie la aspiroj de la homoj al trankvilo kaj paco regas la agadon de la politikistoj. Ja la plej sunriĉa tago ne estas sen angoroj tie, kie la ombroj de l'milito videblas.